VIa jaro. — No 80 Unu numero : 6 SPESDEKOJ (15 centimoj) 20 Junio 1910

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

KAJ DE INTERNACIA INSTITUTO DE ESPERANTO

Duonmonata Internacia Gazeto

Direktoro : HECTOR HODLER

ABONO

Jara Abono. . . . . 1,60 ₷ (4 frankoj)

La abonoj komenciĝas de la 1a de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agentoj.

Redaktejo & Administrejo : *10, rue de la Bourse*, GENÈVE (Svisujo).

REKLAMO

Ĝeneralaj Agentoj : Esperanto, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo). G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris ;* C.-A.-G. Browne, 20, Wellington St., Strand, *London W.-C. ;* Germana Esp. Librejo, Sternwartenstr, 40, *Leipzig* Bigalke kaj Mohwinkel, Schleinitzstr. 6, *Bromberg*, Berger, c/o Spineux, 3, rue du Bois-Sauvage, *Bruxelles*. — Vidu la tarifon sur la 3a paĝo.

Dum la lasta duonmonato

En sukcesplena Tutrusa Esperantista Kongreso okazinta en Peterburgo, oni decidis inviti la Esperantistaron, ke ili kongresu dum 1912 en Varsovio.

La tagordo de la laboraj kunsidoj dum la Kongreso de U. E. A. en Augsburg jus estis fiksata.

La nombro de la Esperantiaj Entreprenoj atingas 154. Dum la 5 unuaj monatoj de 1910, estis ricevataj aŭ forsendataj de la Centra Oficejo de U. E. A. entute 11.706 korespondajoj.

Ĉu de supre ?
Ĉu de malsupre ?

Laŭ la opinio de ankoraŭ multaj personoj en niaj vicoj, nia movado sukcesos nur kiam al ĝi estos varbataj kiel eble plej multaj sciencistoj, politikistoj aŭ altranguloj, unuvorte, kiel ili ŝatas diri, « eminentuloj ». Tiun kredon havas ne nur tiuj homoj, kiuj volonte flirtas ĉirkaŭ la eminentulaj rondoj, sed ankoraŭ multe da aliaj modestaj anoj de la Esperantista popolo, kiuj neniam kuraĝos kredi, ke la venko povus dependi de ili. Ilin multe pli ĝojigas la aprobado de iu sciencisto ol la enviciĝo de deko da novaj samideanoj, modestaj kaj neordenitaj, kiuj en sia modesta rondo lernos Esperanton, ĝin uzos, ĝuos ĝiajn profitojn kaj ilin diskonigos.

Mi ja tute ne intencas aserti, ke la aliĝo de sciencistoj aŭ « eminentuloj » estas neutila por nia afero. Tio estus nek justa, nek ĝusta. Kelkaj faris al ni ŝatindajn servojn, almenaŭ per simpla aprobado. Aliaj, certe la plej utilaj, ne nur aprobis Esperanton, sed havis la aplaŭdindan kuraĝon kaj oferemon verki Esperante; ilia nombro bedaŭrinde estas fingre kalkulebla. Aliaj donis al ni idismon kiu — laŭ mia opinio — estas servo, tial ke ĝi permesis al multaj, turmentitaj de lingvistikaj skrupuloj, emancipiĝi ekster niaj vicoj. Sed entute tio ne estas tre grava kompare kun la rolo ludita de la popolo mem, de tiu granda Esperantista anaro, kiu ĉerpas siajn plej fervorajn batalantojn ne el la altrangaj sferoj, sed el homoj de modestaj sociaj kondiĉoj, laboristoj, oficistoj, instruistoj. Pri ĉi tiuj oni ne multe parolas, sed dume ili uzas Esperanton, ĝin vivigas. El ili konsistas niaj organizajoj ; al ili sin turnas niaj festoj ; per ili konstante disvolviĝas nia afero, ne timante la individuajn perdojn, ĉiam kompensatajn per novaj rekrutoj. Ĉu la « eminentuloj » konsentas fariĝi grupsekretarioj, delegitoj, kasistoj ? La respondo ne estas duba. Ĉie, la motoroj de Esperantismo, t. e. niaj grupsekretarioj, niaj delegitoj, k. a. estas el la popolo. Ke ilia laboro estas utila neniu neos. Ke ĝi estas necesega ne ĉiu konscias. Forigu el nia movado tiun milon da homoj, kiuj ne timas la modestajn materialajn taskojn kaj ilin plenumas kvankam ili plej ofte redonas nek ovaciojn, nek publikajn laŭdojn, sed postulas realajn oferojn-vi per tio mezuros kiom Esperantismo ŝuldas al ilia laborado. Nur dank'al ili vivas nia afero. Ĉar neniu el ili volas gvidi nian movadon kaj revolucii la mondon, ili tiom pli bone kaj trafe laboras en sia limigita regiono kaj lando, kies homojn ili profunde konas. Dum la sciencisto ĝenerale lernas Esperanton pro teoria kaŭzo — snpozante ke li bonvolas ĝin lerni — la popolo studas ĝin por praktikaj celoj, kaj konstatante ke per ĝi malfermiĝas novaj horizontoj, ke pligrandiĝas ĝiaj konoj, ke trans ĝia lando, ĝis nun preskaŭ sola agadkampo de ĝia penso, vivas homoj kun similaj priokupoj, pensoj, idealoj, ĝi restas profunde alligita al Esperantismo, ĉar ĝi alportis ion novan, ion kiu ĉe la popolo kreas nerezisteblan konvinkon kaj fervoron. Per la laborado de tiuj homoj ni vivas, per ili fariĝos niaj progresoj, multe pli ol per klopodado ĉe sciencistaj rondoj aŭ atendado ĉe la registaraj antaŭĉambroj. La unua kondiĉo por venki estas la forto. Tiun forton povas doni nur la popolo : forton de l'nombro, forton de l'konvinko, forton de l'simpleco kaj trankvila sagaceco, forton de l'kreanta laboro.

Mia konvinko : Esperantismo restu esence populara movado, la Esperantista popolo lernu pli kaj pli konfidi ĉefe al si mem, nia ĉiutaga agado sin turnu al la popolaj rondoj. La aliaj sekvos vole-nevole.

H. HODLER.

◆

SOCIA VIVO

JURO

Nova registaro en Kroatujo. Nuligo de la Zagreba proceso

Okazis al mi, ke parolante kun iu fremda amiko pri Kroatujo, li min demandis : « ĉu ne, tiu hungara provinco ? »

Kaj vere en la mondo oni scias nenion aŭ tre malmulte pri Kroatujo. Ĝi estis iam tute memstara regno kun propraj reĝoj, poste ĝi formis kun Hungarujo ŝtatan union — kaj en tiu formo, krom iaj perditaj rajtoj — ĝi ekzistas hodiaŭ ankoraŭ.

La hungara-kroata kompromiso de 1868 nomata ankaŭ « komuna fundamenta leĝo » deklaras ke : la triunua regno Kroatujo, Slavonujo, Dalmatujo estas speciala regno kun aŭtonomaj institucioj, kun propra « sabor » (deputataro) kaj banuso (anstataŭisto de la reĝo en Kroatujo kaj la plej alta estraro kiel en Irlando : Lord lieutenent ; germane : Banus, itale : bano) kaj formas kun Hungarujo « unu kaj saman ŝtatan komunecon ».

Kroatujo, Slavonujo, Dalmatujo ne estas do provinco ĉar ĝi posedas sendependan teritorion kaj formas sendependan nacion.

La rajtoj, kiujn la triunua regno ĝuas, rezultas el la jam citita hungara-kroata kompromiso de 1868 kaj tiuj ĉi estas : La triunua regno sendas en la parlamenton en Budapest 40 delegitojn, al kiuj estas permesite tie uzi la kroatan lingvon.

Sur la kroata teritorio la sola oficiala lingvo estas la kroata. Kroata landmilitistaro havas kroatan komandlingvon. Por Kroatujo ekzistas en Budapest speciala kroata ministro.

Nun iom pri la Zagreba proceso. Kiel niaj legantoj jam scias la 7. oktobro 1909 oni kondamnis pro tiel nomata « regna perfido » du personojn je 12 jaroj, unu je 8 jaroj, tri je 7, dek je 6, dekkvin je 5 jaroj de severa malliberigo.

Jam en la januaro 1910 oni liberigis ĉiujn kondamnitojn krom la du fratojn Adamo kaj Valeriano Pribičević, kiuj estis kondamnitaj je 12 jaroj. Nun la 4an de aprilo la plej alta juĝa kortumo en Kroatujo — la « sepvira tablo » — nuligis la tutan procesan sentencon, liberigis la du lastajn malliberigitojn kaj ordonis la refaron de la proceso je utilo de la kondamnitoj.

Tiu ĉi proceso, kiu estis bazita sur falsaj dokumentoj kiel la proceso Friedjung en Wien, trovis nun sian finon dank'al ŝanĝo de la registaro.

Konstitucia aŭroro aperas ankaŭ sur la kroata horizonto kaj la kroata popolo danke memoras ne nur je la klopodoj de la propraj filoj, sed ankaŭ je ĝiaj senlacaj defendantoj antaŭ la mondo — je la fama angla verkisto Seton Watson (Scotus Viator) kaj la ĵus mortinta granda Nord. Bjœrnstierne Bjœrnson.

◆

KOMERCO

Komercaj novajoj el Germanujo.

Laŭ la raportoj de la grandaj ŝipsocietoj germanaj por 1909 la komerco inter Germanujo kaj la eksterlando pliboniĝis kompare kun la ciferoj de la jaro 1908. Ankaŭ dum la unuaj tri monatoj de jaro 1910 ni povas konstati konstantan progreson. Eniris en la ĉefaj havenoj de Norda kaj Baltika Maroj dum la monatoj januaro ĝis marto netaj registrotunoj :

Hamburg	2.566.680	2.751.655
Bremen	717.425	737.497
Stettin	186.914	272.100
Antwerpen	2.405.481	2.539.265
Rotterdam	1.922.737	2.191.175
Amsterdam (brutaj)	775.208	848.614

Sekve de la konstanta kreskado de la komerco en Hamburgo la registaro estas devigita projekti novajn havenbasenojn, kiuj postulos elspezojn de ₷ 22.500,000. La Hamburga parlamento konsentis je la projekto, kiu tuj estas komercita.

En la komenco de 1909 oni enkondukis en Germanujo la ĉekkontojn ĉe la poŝto. La uzo de tiu ĉi praktika institucio atingis amplekson tute ne atenditan. La sumoj debititaj kaj kredititaj atingis preskaŭ 45 milion. Sm. je ĉiu flanko. La nombro de la kontoj estis je l'fino de la jaro 36.427, el kiu nombro Aŭstrio nur alvenis 12 jarojn, post la enkonduko de la ĉekkontoj. Ni trovas jenajn nombrojn ĉe la ĉekoficejoj :

Berlin 6.995, Kœln 6.929, Leipzig 6.639, Frankfurt 3.579, Hamburg 3.005, Breslaŭ 2.960, Karlsruhe 2.582, Hannover 2450, Danzig 1288.

Oni eble miros, ke la granda komercurbo Hamburg staras nur en kvina vico kaj ne havas la duonan nombron de la ĉekkontoj de Leipzig. La kaŭzo esta jena : en Hamburg la maniero de transpago jam de longa tempo estas enkondukita ĉe la komercistaro kaj eĉ ĉe la metiistoj kaj la privatuloj.

Ĉiu havas ĉekkonton ĉe iu banko, kiu estas plifaciligata per la filioj (deponkasoj) de la bankoj en la antaŭurboj. Cetere la bankoj pagas interezojn por la kredito, dum la poŝtĉekoficejo tion ne faras. Ankaŭ la lasta debitas kostojn por ĉiu pago, kion ne faras la bankojn. Tamen kompare kun la poŝtmandatoj la pagoj per poŝtĉekoj aŭ transskriboj estas grava plifaciligo.

La Germana poŝtadministracio interkonsentis kun la najbaraj landoj Aŭstrio kaj Svisujo por enkonduki la ĉekservon inter la tri landoj.

⁂ La organizo de la senfadena telegrafado en Germanujo (sistemo Telefunken) tiel pliperfektiĝis, ke hamburga ŝipo sukcesis interrilatiĝi kun la stacio en Naŭen apud Berlin ĝis Kamerun. En Germanujo nun estas pli ol 70 vaporŝipoj kun aparatoj laŭ tiu sistemo. Pli ol 60 % de ĉiuj senfadenaj stacioj en la mondo estas fabrikitaj en Germanujo.

Vogler (Del. Hamburgo).

◆

GEOGRAFIO

Rapidaj notoj pri Kolombio

La Respubliko de Kolombio, kies nomo estis prenita el alnomo de la eltrovinto de la novmondo, kuŝas nordokcidente de Sudameriko inter la du grandaj oceanoj Pacifika kaj Atlantika. La marbordoj de longeco preskaŭ samaj formas pli aŭ malpli la duonon de ĝia perimetro longa 10.500 km. La surfaco de la lando havas 1.250.000 km. ; el tiuj ĉi 1.000.000 estas neloĝitaj. La loĝantaro atingas 4.500.000 de rasoj blanka, amerikana kaj nigra ; superregas la unua kaj ĝia miksajo kun la dua.

Topografie Kolombio estas partigita en du regionoj : okcidenta kiu estas loĝata kaj orienta preskaŭ dezerta.

Malgraŭ la situacio inter la tropikoj, Kolombio prezentas ĉian variecon de klimatoj pro la diferenco de altecoj, la multaj hidrografiaj riveraroj, k. c. Ne estas veraj sezonoj : la periodoj de sekeco kaj pluvado kiuj alternas ĉiutrimonate estas nomataj *somero* kaj *vintro*.

La naturaj produktajoj en Kolombio estas pli abundaj ol en kiu ajn alia lando de la globo : oro en granda kvanto en la Departamentoj Antioquia, Tolima, Cauca, Huila, Caldas, Narino kaj Santander : arĝento en Antioquia, Cauca, Caldas, Tolima kaj Santander; plateno en Choco; kupro en Boyaca kaj Magdalena ; smeraldo, kies minoj estas la plej riĉaj el la mondo, en Boyaca ; terkarbo, sulfuro, petrolo, k. t. p.

Salo abundas en Kolombio ; ĝi estas eltirata el maraj salejoj, el multaj salaj fontoj kaj el grandaj pelvoj de gemsalo en unu kaj alia flanko de l'orienta montaro.

Kolombia kreskajaro prezentas variecon kaj belecon nekompareblajn ; ĉia klaso de lignajo por konstruado kaj de meblofarado, orkideoj kies atingo estas la okupo precipe de multaj fremduloj estas grandvaloraj. La bestaro kvankam riĉega estas malpli ol la mineralaro kaj vegetajaro.

La plej gravaj havenoj Atlantikaj estas Riohacha, Santa Marta. Puerto Colombia — Barrankuilla — kaj Cartagena, kaj en la Pacifika, Buenaventura kaj Tumaco.

La ĉefaj industrioj estas : minerala, terkultura, komerca ; apenaŭ ekkomencas manufaktura. Estas en ekspluato 1.000 km. de fervojo, en malsamaj regionoj.

Ĉiuj urboj eĉ la malpli gravaj estas komunikigataj per telegrafo kaj la komunikoj al eksterlando ĉiutage grandiĝas.

La buĝeto de enspezoj kaj elspezoj estas ĉirkaŭ 24.000.000 ₷. Metra dekuma franca sistemo de pezoj kaj de mezuroj estas oficiale akceptita. La mona unuo estas la ora *peso* (2 ₷).

La ekstera ŝuldo atingas ₷ 26.000.000.

La registaro estas kiel la aliaj amerikanaj landoj respublika. La militistaro en paca tempo estas 6.000. La fremduloj estas ĝenerale tre estimataj ; ili ĝuas preskaŭ pli da garantio ol la landanoj, kiel estas elmontrite en niaj malfeliĉaj kaj abomenindaj civilaj militoj.

Sendependeco komencis la 20an de Julio de 1810 kaj finiĝis en batalkampo de Boyaca la 7an d'Aŭgusto de 1819. Pro tiu longa milito kaj pro aliaj cirkonstancoj nia vivo kiel libera nacio estis malkvietigita. Feliĉe ni iras nun jam sur pli bona vojo. Hodiaŭ ni ĉiuj volas eniri en la progresadon kaj en la civilizacion.

La plej grava okazintajo en la unua jardeko de tiu ĉi jarcento estas perdo de Panama ; la historia sankcio diros, kia estis la kaŭzo de tiu ĉi senrajtajo. Kanalo de Panama kiu konsumis multajn vivojn, grandegajn sumojn kaj energiojn antaŭ ol malfermi la vojon inter la du grandaj oceanoj, ŝanĝante tiel eksterordinare la universalan komercon kaj gravegajn interesojn de grandaj regnoj, estos ĉiam paĝo malluma en la glora libro de ĝia historio.

Restas al ni, feliĉe, en Choco, terkolo el Sankta Pablon, kiu malkunigas la riverojn Atrato kaj Sankta Johano kies enfluajoj estas super Atlantika kaj Pacifika kaj kiu fosota frue aŭ malfrue unigos tiujn akvovojojn formonte veran internacian kanalon sen tiom da perdoj de homoj kaj mono.

Nune, la lando okupas sin pri la formado de nacia kunveno kiu celas reformi nian konstitucion en tiuj punktoj kiuj estas kaŭzoj de gravegaj malkonsentoj inter niaj aktivaj partiaj. Se ĝi plenumos iom la deziroj de Kolombianoj, ĝi estas politika okazintajo kiu estos unu el festajoj en la jarcento de nia sendependenco.

Dro A. de Rico (Del. Sogamoso).

Fervojo Laŭlonge de Afriko 1).

Kiam la generacio, kiu nuntempe regas la mondon, sidis sur lerneja benko kaj lernis geografion, tuta Mez-Afriko estis tiam nur blanka makulo. Misteraj, tute nekonataj landoj etendiĝis sur tiu spaco, ĉirkaŭ kiu la Eŭropanoj fondis siajn koloniojn. Jam de longe havas tie siajn posedajojn Portugaloj, Francoj, Angloj, Germanoj, sed dum longa vico da jaroj, neniu provis enpenetri en la fundon de « nigra kontinenta », kiel la geografoj nomas Afrikon.

Kaj poste subite, en la daŭro de kelkê da dekoj da jaroj okazis eksterordinaraj malkovroj. Sur tiu grandega blanka makulo komencis aperadi en la geografiaj atlasoj novaj landoj, montoj, lagoj, riveroj. Malkovradis ilin penege Livingstone, Mauch, Cameron, Schweinfurth, Schnitzer, Gessi, Do Holub, Stanley. Dum proporcie mallonga tempo oni atingis en la fino de l'pasinta jarcento pli multe, ol dum tutaj antaŭaj jarcentoj. Eĉ la malgranda Belgujo aperis en Afriko kiel konkeranto kaj pioniro de civilizacio. Sed inter ĉiuj popoloj, kiuj iam ajn ludis rolon en Afriko, la Angloj evidentigis la plej grandan koloniigan talenton kaj ili ankaŭ tie plej multe efikis, precipe sur kampo de paca konkero.

Sian verkon ili daŭrigadis persiste, konsekvence kaj kun mirinda prudento. Sciante, ke ĉiu stacidomo fariĝas centro de grandega influo sur la tutan regionon, paca fortikajo, ne malpli bona ol milita fortikajo, komprenante, ke ĉiu vagonaro konkeras la landon pli daŭre, ol armeaj kolonoj, ili tuj decidis ĉirkaŭzoni Afrikon per reloj. Cecil Rhodes, portanta alnomon de Afrika Napoleono, revis pri fervojo, kiu irus laŭlonge de la tuta Afriko, de plej ekstrema norda rando ĝis plej ekstrema suda rando — ligante Egiptujon en nordo kun Kaplando en sudo, Kairon kun Kapurbo.

La revo de Rhodes efektiviĝis pli rapide, ol li mem estis tion antaŭvidanta dum sia vivo. La lasta parto de tiu fervojo estas finita kaj baldaŭ rapidaj vagonaroj transportados la vojaĝantojn el bordoj de Sud-Afriko al bordoj de Mediteraneo. La antaŭ nelonge malkovritaj landoj fariĝos atingeblaj por ĉiuj. La turisto povos viziti regionojn, en kiuj havis lokon parto de l'prahistorio de homaro, li veturos tra arbaregoj, loĝataj de pigmeaj gentoj, kun facileco li penetros ĝis « la sanktaj akvoj » de Nilo.

La fervojo komenciĝas en la urbo Kap, kuŝanta sur promontoro de la Bona Espero, kiu formas la sudan randon de Afriko inter la Atlantika oceano kaj la Pacifika oceano. De tie ĝi iras tra fruktoriĉa regiono, meze de fruktejoj kaj vinberejoj, trapasas sufiĉe longan montoĉenon kaj venas al la stepo de Karraa. Ĉi-tie en malaltaj montetoj troviĝas kavernoj, en kiuj sur mola ŝtono oni povas vidi sufiĉe lertajn desegnajojn, atestantojn el praa epoko. Veninte trans la pluan montoĉenon kaj poste sur alian flankon de la rivera Vaal, la fervoja relaro kondukas al urbo Kimberley, kiun dum la milito de Angloj kun Boeroj sieĝis la boera generala Cronje.

Poste la fervojo rapidas laŭlonge de limoj de boeraj ŝtatoj, apud Mafeking, kiun dum la aludita milito defendis la angla generalo Baden-Powel. Ĉirkaŭ la granda stacidomo Ŝoŝong loĝas gentoj de Prieva kaj Hotentotoj, poste komenciĝas la lando Bantu kun la ŝtato Matebele. Ĉi-tiu nomo atestas pri malajaj influoj en tiuj regionoj de Suda-Afriko. La malaja-polineziajn influojn pruvas ĉi-tie hejmaj ilaroj, ornamajoj, statuetoj de idoloj. El la aŭstraliaj insuloj venadis en tiujn regionojn amase la Malajoj.

La fervoja relaro iras plue norden tra unutona teritorio kaj ne pli frue, ol en proksimo de l'rivero Zambezi ĝi eniĝas en montoriĉan landon, La grandiozajn akvofalojn de Victoria la vojaĝanto povos observi de ponto, etendiĝanta en grandega alteco. Pri tiuj akvofaloj diras la indiĝenoj : « Mosi oa tunja » — kiu signifas : « Ĉi-tie tondras fumo ». Kaj efektive el simple nesondebla abismo eliĝas terura krakado de tondroj kaj samtempe leviĝas vapornebuloj kaj nuboj de polvigita akvo. La Angloj entreprenis jam la uzadon de fortoj de l'akvofaloj, kiuj provizos la tutan regionon per elektraj forto kaj lumo.

Trapasinte la landon Niassa, la fervojo penetras ĝis la suda rando de la Tanganika, sur kiu la transveturo okazas per vaporŝipoj. Sur alia flanko de tiu lago la fervoja relaro iras laŭlonge de l'rivero Russisi, ĉiam norden, ĝis la lago de Alberto Edvardo. Dekstre leviĝas kovritaj de eterna glacio la vulkanoj Mfumbiri kaj Ruvensori. Apud la lago de Alberto la relaro kontaktiĝas kun fervojo de orienta Kongo, kondukanta laŭlonge de la rivero Ituri al la urbo Stanleyville. Inter Ituri kaj Uelle-Arunsumi etendiĝas grandegaj arbaroj, en kiuj Stanley kun sia ekspedicio, estis elmetita al neimageblaj penegoj kaj malhelpoj. Ĉi tie Stanley trovis genton de pigmeoj Akka-Akka, jaman « taŭe priskribitan de la esploristo Chaillu. De la norda rando de l'lago, de Alberto la relaro iras laŭlonge de Nilo kaj penetras ĝis Vadelai kaj Lado.

De tie per rekta linio la relaro de l'fervojo kuras norden, trans la riveron Sobat kaj atingas la urbon Faŝoda, konatan pro la ekspedicio de l'franca komandanto Marchand kaj pro postsekvinta konflikto inter Anglujo kaj Francujo. Ĉi-tiu parto de l'fervojo prezentis la plej grandajn malfacilajojn dum la konstruado, ĉar inter la riveroj Sobat kaj Nilo etendiĝas grandaj marĉoj. Plue tra la malnovegipta valo, la fervojo iras tra Chartum al Kairo kaj Aleksandrio, centroj de Eŭropana vivo.

La Angloj plenumis memorindan verkon de kulturo kun tiu senbrua persisteco, kiu estas propra al tiu nacio. La mondo preskaŭ neniom sciis pri tiu konstruado kaj sciiĝas nun, ke el Kairo tra la tuta Afriko oni povas atingi Kapurbon.

Leon Rosenstock (Krakow).

◆

KONGRESOJ & FESTOJ

La Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj

La Ia Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj en Bruselo plene sukcesis. Ĉirkaŭ ducent delegitoj de 131 asocioj internaciaj ĉeestis la kunvenojn, inter kiuj pluraj Esperantistoj.

La paroladoj de la malferma kunveno fiksis la ĝeneralajn ideojn, laŭ kiaj laboris la Kongreso.

Sro Beernaert, eksministro kaj Nobelpremiulo, montris, kiel de 1905 interligiĝis la internaciaj asocioj sidantaj en Belgujo, kiuj fine kreis centran oficejon, kiel ili estis instigitaj aranĝi Kongreson de la Internaciaj Asocioj por plifaciligi kunlaboradon inter ili. Li skizis la historion de tiu movado kaj jene konkludis : « Ni nun « devas atente studi la faktojn rilatajn al la « internacia vivo, interrilatigi la diversnaciajn direktantojn de ĉiuj movadoj. « Ni divas plibonigi la laborkondiĉojn per « interŝanĝado de ideoj kaj [illegible] « la faritaj spertoj, laŭ eble forigi la « duoblajn oficojn, fiksi kaj rekomendi la « metodojn juĝotajn plej bonaj. Ni devas « nin okupi multe pli pri la metodoj ol « pri la tujaj rezultatoj ». — Post li Glo Sébert resumis kial la internaciaj asocioj respondis la inviton. « Tiu Kongreso, li « diris, fakte realigas veran reprezentadon de ĉiuj homaroj interesoj ; ĝi estas « grava provo por krei internacian vivon, « kies direktadon havus la grandaj sciencaj asocioj ». — Siaflanke Pro Ostwald rememorigis la konkludojn de la scienco kaj natura filozofio pri organizo, atentigante pri tio, ke la ideo pri ŝparado de la penoj ricevita per la kunlaborado kaj kunordigo havas sian fundamenton en la naturo mem.

La du sekvantajn tagojn, la Kongreso dividiĝis laŭ sekcioj, kiuj interalie priparolis la jenajn temojn : Jura reĝimo de la internaciaj asocioj. Metodoj por la unuecigo de la juro kaj kreo de centra oficejo por jura dokumentado, kiu kolektos la tipajn kontraktojn uzatajn en la diversaj landoj. Starigo de internaciaj sistemoj de unuoj por la sciencoj kaj teknikaj uzoj (kun rekomendo ke ĉiuj asocioj uzu unuojn bazitajn sur la metra sistemo). La dokumentado (kun deziresprimo por la redakto de internacia kodekso por la dokumentado, por la adopto de la decimala klasifiko, por rilatigo de la internaciaj asocioj kun la Brusela Bibliografia Instituto). La scienca kaj teknika lingvo. La funkciigo de la internaciaj organismoj (kun deziresprimo por la starigo de tipa regularo por la kongresoj). La kunlaborado inter la internaciaj asocioj. Pri tio ĉi la Kongreso esprimis la deziron, Io) ke ĉiu internacia asocio delegu unu membron, kiu konstante rilatos kun la aliaj internaciaj asocioj, 2e) ke la internaciaj asocioj havantaj similan celon grupiĝu en specialaj organizajoj, 3e) ke la izolaj internaciaj asocioj kaj grupiĝoj de asocioj, konstante rilatu kun la centra oficejo de la internaciaj asocioj, kiu estos ilia perilo por ĉiuj utilaj rilatoj kaj informoj, ke tiu Oficejo estu rekonata kiel konstanta organo de la internaciaj asocioj por iliaj reciprokaj interrilatoj kaj ĝi ricevu la necesajn monhelpojn por daŭrigi sian tiel utilan kaj gravan agadon.

La Kongreso ankaŭ konsideris, ke estas dezirinda la starigo de interasocia korespondado, speciale pri la dato, loko, tagordo kaj decidoj de la kongresoj.

En unu el la kunvenoj estis diskutita la demando pri internacia lingvo ; en la diskuto partoprenis Glo Sebert, S-roj Bourlet, Ostwald, Cox, Willemotte, k. a. La ĝenerala impreso estis absolute favora al la enkonduko de lingvo neŭtrala kaj tio estis precipe klarigita en la parolado de Sro Lecointe, direktoro de la Brusela observatorio. Dum la Kongreso oni tre multe parolis pri Esperanto. Antaŭ la Kongreso okazis parolado de Sro Bourlet ; poste la parolado de Sro Hodler (parte pepresita ĉi tie). Raportoj pri Esperanto. U. E. A., k. t. p., estis oficiale donitaj al ĉiuj kongresanoj. Plie la ĉeestado de pluraj Esperantistoj ankoraŭ pligrandigis la intereson de la kongresanoj.

Ni aldonu, ke ĉe la tre interesa ekspozicio de la Internaciaj Asocioj, daŭronta dum la tuta Universala Ekspozicio, troviĝas bone aranĝita Esperantista ekspozicio, riĉe provizita je dokumentoj pri Esperanto. Tiu ekspozicio estis vizitita de ĉiuj kongresanoj kaj altiris ĉies atenton.

X.

La Kongresoj en Bruselo

Krom la supre priparolita Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj, okazis en Bruselo, dum la ekspozicio, la jenaj kongresoj : 1)

Internacia Kongreso de ĝardenkulturo, kiu kalkulis ĉirkaŭ 800 ĉiulandajn partoprenantojn.

IIIa Internacia kongreso de Botaniko, kiu speciale priparolis la demandojn rila-

---

1) Laŭ « Nova Reforma ».

1) Ni rememorigas, ke dum la tuta Brusela ekspozicio aperas « Revuo de la Kongresoj » kun Esperanta resumo, konsultota de ĉiuj interesatoj (3 *bis*, rue de la Régence, Bruxelles. Abono 4,80 ₷).

HEJMA BIBLIOTEKO
I. an H. Krestanoff

tajn al bibliografio, dokumentado kaj instruado.

La venonta Kongreso okazos en Londono, dum 1915.

XXVa Mutualista Kongreso belga.

Ia Internacia Kongreso de Tropika Agronomio.

Kongreso de la Internacia kotona federacio.

Internacia Vegetara Kongreso.

Dum la fino de junio kaj komenco de julio, okazos la jenaj kongresoj; 26-29 junio, Internacia Kongreso de Numismatiko; 2-4 Julio, Nacia Kongreso de la Laboristaj loĝejoj; 2-6, Internacia Kongreso de la komunumaj sekretarioj; 17-18 internacia kongreso de la notariaj kandidatoj kaj notariaj oficistoj.

◆

AERVETURADO

Aviada semajno en Berlin. — Flugo super Berlin. — Al aviadistoj Esperantistoj.

La 10-16 majo okazis en Berlin-Johannesthal internacia aviada konkurso, kiu estis la dua Internacia, aranĝita de la ĉi tiea flugsporta societo. Laŭ la oficiala programo partoprenis jenaj aviadistoj : Barono de Caters (belgo); Thornp, Svenden (danoj); Amerigo (franco); de Gorrisson, E. Jeannin, A. Frey, H. Grade, Keidel, Engelhardt, X. Behrend, R. Thelen (germanoj).

La anoncitaj premioj estis disdonotaj parte en internaciaj parte en naciaj konkursoj. La internaciaj konkursoj estis jenaj : 1. *Daŭra flugado*, premioj da 5.000, 1.000 kaj 500 Sm. 2. *Flugado laŭ cirklo*, kun premioj da 3.500 kaj 1.500 Sm. 3. *Surteriĝo sur antaŭe destinitan lokon el fiksita* [illegible] 500, 250 Sm. 4. *Flugo en vertikala kurba linio :* Oni unue rektangule superflugu etenditan ŝnuron, poste duan kaj fine trian. La distanco inter la tri ŝnuroj estu 100 metroj, la alto super la terfundo 10 m.; post la unua sukcese plenumita provo oni plimalgrandigas la distancon inter ŝnuroj. La premio estis donata al tiu aviadisto, kiu flugus ĉe plej malgranda distanco inter la tri ŝnuroj; tri premioj po 2.000, 500 kaj 250 Sm.

5. *Glitflugado.* En interdistanco de 30 metroj oni fiksas du paralelajn liniojn, 10 metrojn alte super la terfundo. Oni subflugu la du liniojn kaj haltigu la motoron inter ili. La premio estis donata al tiu aviadisto, kiu post motorhaltigo ĝis surteriĝo estus farinta la plej longan glitflugadon; du premioj po 2.500 kaj 1.000 Sm.

6. *Ĉiutaga konkursflugado.* La tiel nomita « frupremio » estis donata al tiu aviadisto, kiu unua posttagmeze inter 3 h. kaj 4 h. trifoje ĉirkaŭflugus la flugejon; la premioj po 500 kaj 250 Sm.

7. *Flugado kun pasaĝero.* La naciaj konkursoj estis jenaj. *Premio de Blejhreder.* Por aparatoj kun germanaj gvidantoj. Oni postulas trifojan ĉirkaŭfluon de l'flugejo; dum la flugado la aparato devas surteriĝi du fojojn, po antaŭ la dua kaj antaŭ la tria ĉirkaŭflugoj, sur antaŭfiksitan lokon kaj stari almenaŭ unu minuton ĝis denova altenflugo. La tasko devas esti plenumita post maks. 15 minutoj, kun helpo de maks. du aliaj personoj ĉe la surteriĝo. 2. *Premio de Lanz* por aparatoj konstruitaj kaj gvidataj de Germano, fabrikitaj en Germanujo. La aviadisto devas ĉirkaŭflugi du punktojn, kies interdistanco estas 1.000 m. La dua punkto devas esti ĉirkaŭflugata en mala direkto kompare al la ĉirkaŭflugo de l'unua; 5 premioj po 3.500, 1.500, 1.000 750 kaj 500 Sm.

La flugado multe suferis pro la malfavora vetero : forta vento malebligis ofte la aereniĝon. Gravaj akcidentoj forigis grandan parton de la konkursantoj. Disrompiĝis aŭ difektiĝis, tiel multe da aparatoj, ke el la nombro de la konkursantaj flugmaŝinoj estis flugpretaj nur kvar, en la lasta tago de la konkurso. F.-A. Jeannin disrompis du maŝinojn. Ankaŭ korpodifektiĝoj de la aviadistoj mem ne mankis. La plej grandan parton de la premioj gajnis Jeannin (i. a. li gajnis la premiojn pro daŭra flugado kaj pro ĉirkaŭflugo en la plej malgranda cirklo). La duan lokon laŭ la sukceso okupis Baron de Caters (gajnis la premiojn pro flugado en vertikala kurblinio, pro surteriĝo kaj pro glitflugado). Engelhardt gajnis la premion pro flugado kun pasaĝero. Jam antaŭ la flugo semajno Behrend estis gajninta la 1an premion de Lanz. La aliaj partoprenintoj ne bone sukcesis kaj gajnis nur kelkajn malgrandajn premiojn. Krom tio ke la sukcesoj ne respondis al la antaŭaj esperoj, same ankaŭ mankis la granda amaso de l'publiko. La berlinanoj jam konas flugaparatojn; pro tio la intereso ne estas plu tiel vigla. La fakto estas tre bedaŭrinde, ĉar en tiaj cirkonstancoj ankaŭ suferis esperantista entrepreno. La Esperanto-eldonejo Mœller kaj Borel estis stariginta sur la flugejo tendon, kiu montris la suskribon : « Esperanto informejo ». De sur la tegmento flirtis, eĉ flirtegis pro la ĉiama forta vento, la esp. standardo ! Tiel atentiĝis la bedaŭrinde ne sufiĉe multnombra publiko pri Esperanto. La administracion de la flugkampo mi devas dankegi pro la montrita intereso por la Esp. afero kaj la afableco, ke oni metis al nia dispono taŭgan lokon. Niaj aviadist-samideanoj bonvolu noti tiun ĉi fakton. Mi tre ĝojus, se mi baldaŭ havus la eblecon, prezenti min al la nomita administracio kiel bezonatan interpretanton. Ne forgesu, aviadist-samideanoj, ke oni ankaŭ flugas en Berlin! Kaj antaŭ ne longe oni eĉ flugis super Berlin! La aviadisto Frey ankaŭ partoprenis la kaviadan onkurson, kaj la unua el flugaparato malsupran sur nian urbon. La 23an, posttagmeze, je 7437 Frey ekflugis de sur la flugejo en Johannesthal kaj re- [illegible] Frey estas dudeknaŭjara Germano, kies nomo estas konata de la publika aviadista mondo nur depost la flugkonkurso en Cannes. Laŭ mia opinio li ankoraŭ ne estas ĉiurilate perfekta aviadisto, ĉar li ne posedas Esperanton!

Arnold Behrendt (Berlin).

◆

IDEOJ & FAKTOJ

Pri la kalkulado kaj la senŝarĝigo de la memoro

Inter la Esperantistoj ekzistas rimarkindaj originaluloj. Plenaj de iliaj graveco, kaj plenaj de novaj epoko-farantaj ideoj oni tentas ilin klasifiki kun S-ro Ostwald inter la homoj, de kiuj oni povas atendi grandajn progresojn por la homaro. Mia amiko N. estas tia Esperantisto. Li estas 28-jara, la plej bona tempo por distingi sin, kaj li havas grandan memstarecon en penso, kiun nenio povas influi. Kiel vera Esperantisto li ĉiam diris, ke ĉiuj regnoj devus havi komunan bankon, komunan bankbiletojn, kiuj estus ĉie akceptataj, plenvalore en la tuta mondo. Tio estus granda bonfarado por la homaro, kaj finos la malutilan kaj multekostan interkomercon kun mono.

Kiam mi antaŭ nelonge kunvenis al li, ni paroladis pri la senŝarĝo de la memoro en lernejoj. Kara leganto, mi aŭdis mirindan opinion! Ne kontraŭ la lingvo latina aŭ greka, kiuj estis ordinare la temoj de pedagogoj, sed kontraŭ la kalkulado en la lernejoj li ektondras. Aŭdu lin mem :

— La nombro dek nenion taŭgas kiel fundamenta cifero de la kalkula sistemo. Fundamenta cifero devas esti tiu nombro, kiu havas la plej multajn dividantojn. La plej konvena fundamenta cifero estus en najbareco de 10 la cifero 12; sed tiu ĉi fundamenta cifero estus tro granda, kaj ŝarĝus la infanan memoron ankoraŭ pli multe ol 10 por la pligrandigo de la multobliga tabelo je multobligado kaj dividado. Restas inter la pli malgrandaj ciferoj 8 kaj 6. De mia opinio 6 estus la plej konvena fundamenta cifero. La multobliga tabelo finiĝis jam ĉe 6×6 = 36. La infana memoro senŝarĝiĝis pro tiu, kaj la tutmondo estus dankema por tio novaĵo.

— Amiko mia, mi diris, ne parolu tiel sensencaĵojn. Nia dekuma sistemo disvastiĝis en tutmondo, kun ĝi la kalkulado estas simpla kaj facila, la sesuma sistemo ne fariĝus pli bone. Mi ne komprenas tion.

— La sesuma sistemo estus tute certe pli bona, li respondis. Estonte la cifero 6 estus tiel uzata, kiel oni uzas la dekan nombron hodiaŭ. Skribu do la nombrojn 1, 2, 3... laŭ la dekuma sistemo, kaj skribu malsupren la samajn nombrojn laŭ la sesa sistemo, nome : 1-5 kiuj estas komune en la du sistemoj, malsupren 6 skribu 10, malsupren 7 skribu 11 k. t. p. malsupren 10 venos 14, sub 12 venos 20 k. t. p. Rimarku, ke en tiuj nombroj de dekstre al maldekstre ĉiu cifero ne havas plu la dekoblan sed nur la sesoblan valoron. Per tiu nombrosistemo vi povos kalkuli tiel, kiel vi kalkulas per la dekuma sistemo. Ne uzante plu la ciferojn 6, 7, 8, 9, kiuj havas jam 2 ciferojn en la sesuma sistemo, la skribotaj kalkuloj en la nova sistemo estos pli longaj ol en la dekuma sistemo, sed mi ne aŭdis ankoraŭ plendon, ke oni bezonas multe da papero en niaj kalkuladoj.

— Mia amiko, mi diris, vi estas sensenculo. Mi skribu 14an kaj legu aŭ pensu 10an! Tio estas ja kolosa!

— Certe ne, li respondis, tio estas tre simpla. Kiel vi nun diras : mi havas dek fingrojn, vi diros estonte, mi havas seskvar fingrojn, kaj vi denombros al mi : unu, du tri, kvar, kvin, ses (skribota 10), sesunu (11), sesdu (12), sestri (13), seskvar (14). Kiel vi nun diras la jaro havas dekdu monatojn, vi diros, la jaro havas duses monatojn. Kiel vi nun diras la tago havas dudekkvar horojn, vi diros estonte la jaro havas kvarses horojn k, t. p. Ni kalkulos nur per la ciferoj 0, 1, 2, 3, 4, 5, vi ne bezonos plu do la multobligan tabelon, la produktojn depost 2×7, 3×7 k. t. p. Certe estus necese, ke tiun ĉi kalkuladon uzus la tuta homaro kiel la lingvon Esperanton. Malgraŭ la grandaj progresoj, kiujn faris la matematiko, ni ne estis indaj de la heredita nombrosistemo. Ĉie oni trovas progresojn, plibonigojn en matematiko, nur la nombra sistemo, kiu eble devenis el tempo, en kiu la kalkulada arto efektiviĝis sen papero sed nur per la dek fingroj kaj ankaŭ per la dek piedfingroj, restas sen plibonigo. Tie ĉi mi vane serĉas progresojn.

— Sed amiko mia, mi diras, ne estu tiel senpraktika. Kion faros la homaro kun la logaritmaj tabuloj, kun aliaj pene kunmetitaj kalkultabuloj, kiuj estas uzataj ĉiutage de multaj instruituloj, ĉu vi volas ilin malaperigi aŭ subite anstataŭi per aliaj en sesa sistemo? Dum cent jaroj vi ne povos ilin denove trakalkuli.

— Tion mi ne postulas, respondis li. La vidpunkto estas same kiel ĉe Esperanto kun la naciaj lingvoj, sed pli simpla; ĉar kontraŭ la sesuma sistemo staras sole la dekuma sistemo, male kontraŭ la Esperanto staras multe da naciaj lingvoj, kaj, kiel malmulte Esperanto postulas subpreni la naciajn lingvojn, tiel malmulte la sesuma sistemo — ve en senfinan tempon — igos ne utilaj la grandnombrajn tabulverkojn de la scienco. La dekuma sistemo restas por la instruituloj. Tiuj tabulverkoj estas uzataj rilate nur de malmultaj homoj, sed la kalkuladon en la kvarfundamenta kalkulo uzas la tuta mondo. Tio estas granda diferenco. Ni parolas pri la senŝarĝigo de la memoro, kaj mi kredas ke la tuta mondo havus rajton ankaŭ por postuli faciligon. Niaj praavoj sentis instinkte la utilon de la sesuma sistemo. Ĉie ni trovis ĉe ili, ke la sesa sistemo ne en pura formo, sed praktike estis pli uzata, ol la dekuma sistemo. La klafto havis ses futojn, la futo havis 2×6 colojn, la tago havas ankoraŭ 4×6 horojn, la horo havas 6×10 minutojn, la guldo havis 6×10 krajcerojn, la libra papero havis 4×6 paperfoliojn k. t. p. Resume en la praktika vivo de niaj praavoj ĉiuj dividoj montris la superon de la sesa sistemo. La homaro, ne irante la pli justan vojon, ne forlasinte la dekuman sistemon, ilin ne anstataŭinte per la sesa sistemo, forlasis la sesajn dividojn, malfaciligis la kapokalkuladon, kaj faris nenion por senŝarĝigi la memoron.

Mi nun direktis la paroladon je la divido de la cirklo.

Li respondis : La unua homo, kiu provis dividi la perimetron de la cirklo, ĉiuokaze uzis la radion, per kiu li desegnis la cirklon mem, kaj mi tie trovis denove la nombron ses, eĉ ŝajnas, ke la plua divido estas denove en ses partoj (6×6) kaj la dividado en 10 (=6×6×10) venis pli malfrue. Sed lasu tion Nun mi volas, ke vi havu kelkan profiton, de nia parolado. Faru du tabelojn, unuan por la ŝanĝo de la ciferoj el la deka en la sesuma sistemo, kaj alian por inversa celo kun du eniroj, supren 1, 10, 100, ktp. flanken 1. 2. 3... Cetere multipliku 2 nombrojn de 8 ĝis 9 ciferoj, inter kiuj la ciferoj 7, 8, 9, ofte troviĝas, ŝanĝu la nombrojn donatajn kun la unua tabelo de la deka sistemo en la sesa sistemo, kaj faru la multobligon en tiu sistemo; vi vidos, ke la dua multobligo estas ne nur pli facile, sed ankaŭ pli certa. Ŝanĝante la duan produkton kun la dua tabelo en la deka sistemo, vi havos certecon, ke vi ne faris eraron. Kiu faras multe da multobligoj per grandaj numeroj ne havante la tabelojn de Crelle neniam forlasu tiun provon.

Mi sekvis la konsilon de mia amiko, sed mi ne kalkulas en la sesa sistemo 3×4=12; 12 enhavis 2 sesojn, tial skribu nulon kaj forprenu duon. Tiamaniere mi havas utilon, de tiuj frenezaj ideoj de mia amiko. Ĝis lia sistemo estos akceptota, mi kredas. ni ambaŭ ne estos pli sur la mondo. Mi deziras al ĝi bonan sukceson.

Fungo.

La Reformo de Kalendaro.

La demando pri la reformo de l'Gregoria kalendaro estas nune tre diskutata kaj favore konsiderata en Eŭropa gazetaro. La nova projekto kiu devas anstataŭi la nunan sistemon, trovas ĉie favoran akcepton. Sed la legado de kelkaj artikoloj, kiuj lastatempe aperis en la ĉiutagaj gazetoj, riskas disvastigi malĝustajn ideojn koncerne la devenon de l'projekto. Oni do permesu al mi fari tie ĉi mallongan historian resumon pri tiu demando.

Precize antaŭ 10 jaroj, la 9. Aprilo 1900, post komuniko prezentita al Societo de l'Artoj pri la decimaligo de l'tago kaj de l'horo, kiujn oni tiam diskustis, l'aŭtoro de tiuj linioj esprimis la ideon ke alia reformo ankoraŭ pli grava urĝas : nome tiu de l'kalendaro. La *Journal suisse d'horlogerie* (Svisa jurnalo pri horloĝarto), en sia No de Majo 1900 publikigis detalan raporton pri tiu reform-projekto. Multaj gazetoj en Svisujo, Francujo kaj precipe Germanujo, diris pri ĝi aprobantajn vortojn. Tre malmultajn kritikojn kaj kontraŭparolojn oni faris.

Sed reformo de l'kalendaro povas efektiviĝi nur se ĉiuj landoj, almenaŭ Eŭropaj, interkonsentas pri ĝia alpreno. Pro tio, dum multaj jaroj tiu projekto restis senefika. Tamen, tiu unua ideo kvazaŭ semaĵeto forlasita al ĉiuj ventoj de antaŭ 10 jaroj, iradis sian vojon en la ombro.

La konstanta komitato de la internaciaj kongresoj de la komerc-ĉambroj kaj de la Komerc- kaj Industriasocioj metis en la tagordon de la 4a Kongreso en Londono, Junion 1910, la jenajn temojn : *Malgrandigo de la variebleco de l'dato por Pasko : Unuformigo kaj plisimpligo de l'Gregoria Kalendaro.*

La Industria kaj Komerca societo de Nederlando en Harlemo, post diskuto kaj laŭ la propono de unu el siaj anoj, kiu konis la projekton elirintan el Ĝenevo, decidis proponi al la Kongreso la jenan deziron:

> La Kongreso, k. t. p., esprimas la deziron :
>
> 1e Estu, la unua tago de Pasko fiksota je la unua dimanĉo post laŭ 4a de Aprilo, laŭ la deziro de l' « Deutscher Handelstag » (Germana komercetago).
>
> 2e Estu, por la profito de l'komerco kaj industrio, la Gregoria kalendaro simpligota laŭ la modelo de l'kalendaro proponita de prof. Grosclaude el Ĝenevo.
>
> 3e Estu, la enkonduko de tiel reformita kalendaro kiel eble plej disvastigota.

Tiu raporto subskribita de Joh. Enschede, prez., kaj de G. S. de Clercq, sekr., estis publikigata kaj sendata al ĉiuj Komercĉambroj kaj Industriaj asocioj.

Intertempe, la Ĝeneva Komerc-ĉambro pro la lerta iniciateco de sia sindonema vic-prezidanto D-ro A. Georg, forte rekomendis tiun reformon per la Komerca k. Industria Bulteno Svisa; tiel la aprobo de la Svisaj delegotoj al la Londona Kongreso estas certigita por ĝi.

Du vortoj nun pri la projekto mem de l'kalendaro por la legantoj kiuj ĝin ne ankoraŭ konas. Imitante liberecon, kiun uzis imperiestro Juliano aldoni ĉiu-4 jare unu tagon, kaj Papo Gregorio forpreni tri tagojn ĉiu-400 jare, por akordigi la kalendaron kun la sezonoj, t. e. kun ekvinokso kaj solstico, mi pensis ke oni povus sekvi la saman vojon decidante ke la jaro enhavos nur 364 tagojn, la 365a estante aparta tago. Tiu tago jus antaŭirus la 1an de Januaro kaj estus nomata « Novjar-tago » aŭ alie se oni preferus. La apartigo de tiu tago ne estus malhelpo en la komerca vidpunkto, ĉar en la civilizaj landoj, ĝi estas kutime festo-tago. Se oni akceptus tiun ideon, la cetero de l'projekto fluas el ĝi tute simple. La 364 tagoj dividiĝas nature laŭ kvar egalaj partoj kaj tio alportas la profiton ne ŝanĝi nian kutimon paroli je duonjaroj kaj kvaronjaroj.

Ĉiu kvaronjaro havante 91 tagojn dividiĝos ankaŭ ekzakte laŭ 13 semajnoj tiamaniere ke, se kvaronjaro komencas per lundo, ĝi finiĝas per dimanĉo. La tutan projekton enhavas tiuj klarigoj. Lokota restas ankoraŭ la 29a de Februaro en la superjaroj de la Gregoria kalendaro. Ni proponas loki inter la 31a de Junio kaj la 1a de Julio unu tagon, kiu simile al Novjar-tago ne estus parto de semajno. Laŭ tiu metodo la superjaroj konsistus el egalaj duonjaroj formitaj el unu speciala tago sekvota de 26 plenaj semajnoj.

Unu el la konsekvencoj de la alpreno de tiu kalendaro estos en la civila kampo faciligi la definitivan fiksadon de la naciaj festo-tagoj, kiel ankaŭ de liber-tempoj por la lernejoj kaj juĝejoj, por la parlamentaj labortempoj, k. t. p. Laŭ la komerca vidpunkto, ĝi alportus profiton en tiu senco ke la 30a tago de monato neniam estus dimanĉo; dum la 31a (lasta tago de ĉiu kvaronjaro) ĉiam estus dimanĉo; ĉiuj monatoj do fine valoras 80 tagojn. Procentaj kalkuloj kaj komercaj bilancoj estos konsekvence plifaciligataj, krome tiu kalendaro ŝajnas alporti tiun alian profiton, ke oni povas facile ĝin enmemorigi kaj ke ĝi alligas niajn kutimojn kiel eble malplej.

Al tiu demando pri la reformo de l'kalendaro aldoniĝas tiu de la plisimpligo, eventuale de la fiksado de la Paska, dato. La propono kiu ŝajnas preferinda lokigas tiun daton inter la 4a kaj la 10a de Aprilo ĉe la Gregoria kalendaro, kaj neviarieble je la 7a de Aprilo laŭ nia projekto. Tiurilate, oni povis timi ian kontraŭstaron de l'Vatikano. S-ro de Clercq en sia raporto diras : « Tiom kiom oni povas juĝi laŭ publikigitaj dokumentoj, la Eklezio ŝajnas inklina apogi movadon por Paska reformo ». Tiu opinio ŝajnas prava, ĉar ĉiuj gazetoj represis informon el Romo, laŭ kiu la Papo intencus proponi al la Eŭropaj ŝtatoj tre grandajn modifojn en la Gregoria kalendaro. Tiuj modifoj estas precize la ĉi supre priskribitaj.

Proponi reformon eĉ bonegan kaj akceptigi ĝin estas aferoj tre malsimilaj. Nur la registaroj povas decidi pri tio. Ni esperu, ke ili estos kondukataj al tio per la influo de la diversaj manifestadoj kiuj ekaperas nune. S-ro de Hesse-Wartegg, ekskonsulo ĝenerala, kiu jam estis propagandisto por la normala horo nun alprenita de preskaŭ ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj, varme petas ke Germanujo kaj Aŭstrio rapidu akcepti tiun reformon ne atendante la ceterajn landojn. Tio estas maniero iom rapida, sed estus tiom pli dezirinda, ke je la 31a de Decembro 1911 la transiro de la malnova sistemo al la nova povus efektivigi senskue, ĉar tiu tago estas dimanĉo en ambaŭ sistemoj. Tamen, preskaŭ neesperebla estas solvo en tiel mallonga tempo. Favora cirkonstanco estas la fakto ke la reformprojekto venas el neŭtrala lando, kaj tio povos nur faciligi ĝian akcepton. Mi tre ŝatus vidi la Federacian Konsilantaron de Svislando preni la aferon en manoj, ĉar ĝi estas oficiala povo tre taŭga por konduki tiun aferon al sukceso.

L.-A. Grosclaude (Genève).
Trad. R. de Saussure.

P.-S. — Tiu ĉi artikolo artikolo estis jam kompotista, kiam mi legis artikolon pri la sama temo aperintan en *Germana Esperantisto* (Majo). En tiu ĉi lasta artikolo oni konsideras Sron de Hesse-Wartegg, kiel elpensinton de la priparolita reformo de l'kalendero. Tio ne estas ĝusta : S-ro de Hesse-W. nur *propagandas* por tiu reformo, sed prof. Grosclaude ĝin publikigis jam en 1900. Tamen alia neatendita fakto jus okazis : la 9 Majo la *Journal de Genève* publikigis novan leteron de prof. Grosclaude, per kiu tiu ĉi sinjoro konfesas, ke laŭ jusa sciigo, tiu reformprojekto estis jam proponita de S-ro Armelin, el Parizo, kiu publikigis ĝin en la jaro 1887. Tiu ĉi jaro estis do signifoplena por la estonteco de l'homaro, car ĝi estas la sama en kiu aperis ankaŭ la projekto de D-ro Esperanto.

R. de S.

◆

Homara Dataro

16 *Junio*. 1896. — Ribelo de insulo Kandjio aŭ Kredo.

17. 1815. — Batalo ĉe Waterlo. — 1789. La tria ŝtato formas la nacian kunsidon.

18. 631. Mortas profeto Mahometo. — 1155. Frideriko unua el Svevio estas kronita imperiestro. — 1875. Mortas portugala poeto Antono Feliĉano Castilho el Lisbono.

19. 551. Antaŭ Kristo; Naskiĝas Konfuĉio (*Kon-fu-tse*). filozofo kaj religia majstro, kreinto de la ĥina ŝtatreligio. — 1657. Kardinalo Leopoldo Medici stariĝas en Firenco la faman akademion de l'Ĉimento (eksperimento) por la studado de la fizikaj sciencoj. Ĝi daŭris 10 jarojn.

20. 1597. Mortas en Novaja Zemlja, holandana marveturanto Wilhelmo Barent.

22. 1805. Naskiĝas en Ĝenovo, patrioto kaj filozofo Jozefo Mazzini. — 1497. Johano Caboto albordiĝas ĉe la marbordo de Labradoko. — 1527. Mortas Nikolo Macchiavelli, sekretario de la Firenca Respubliko, kaj historiisto.

23. 79. Mortas imperiestro Vespasiano.

24. 1866. Batalo ĉe Custoza inter Italoj et Aŭstrianoj.

25. 1574. Mortas artisto Georgo Vasari.

26. 1771. Naskiĝas la fama skota novelisto kaj poeto Walter Scott.

27. 1861. Mortas Roberto Burke, irlandano, kiu trairis Aŭstralion. — 1712. Naskiĝas apud Ĝenevo la mondfama filozofo, poeto kaj botanikisto Johano Joakobo Rousseau.

29. 1880. Konferenco en Berlino kiu fiksas la ŝtatlimojn de Grekujo.

◆

La Faktoj

19 *Majo*. — Palermo. — Inaŭguro de la elmontro de la historiaj memorajoj de jaro 1860.

20. Venecio. — Kondamno de la rusaj mortigintoj grafino Tarnowska, Naumow kaj Prilukow.

Londono. — Solena enterigiro de reĝo Edvardo VII.

22. Verono. — Inaŭguro de aviada Konkurso.

25. Bruselo. — Oni inaŭguras en la internacia ekpozicio la elmontron de belartoj.

26. La Manche. — La franca submara ŝipo *Pluviose* pro ektuŝego kun vaporŝipo atingas la fundon de la maro; pereas 27 maristoj.

27. Palermo. — Solena inaŭguro de monumento rememoriga pri la eniro de Garibaldi.

28. Baden. — Mortas fama bakteriologiisto, profesoro Roberto Koch.

29. Verono. — Aviadisto Duray falas kaj restas grave vundita.

A. Tellini.

◆

Ia Kongreso de U. E. A.

AUGSBURG

28 Julio-3 Aŭgusto 1910

LABORPROGRAMO

Jen la programo de la temoj traktotaj de nia Kongreso. Ĝi kompreneble povos ricevi ankoraŭ kelkajn negravajn modifojn kaj aldonojn.

Jaŭdo 28 Julio

5 h. *Solena malferma kunveno* (paroladoj de la Prezidanto de U. E. A., urba reprezentanto, k. e).

Vendredo 29 Julio

9 h. 1/2. *Raporto de l'Administra fakestro* (H. Hodler).

Propono pri reviziado de la statuto (organizo de la centra oficejo, kreo de aprobantoj kaj dumvivaj membroj, regionaj kasoj, regionaj kaj distriktaj kunvenoj, reprezentantoj de fakaj asocioj. (Prop. H. Hodler.

Diversaj proponoj.

3 h. *Raporto pri la fakoj konsuloj & Esp.-Oficejoj.*

Plakoj kaj afiŝejoj por Esp.-Oficejoj.

Konsuloj por laboro.

Sabato 30 Julio

9 h. 1/2. *Raporto de l'financa fakestro* (Rousseau).

Propono pri la kotizajoj dum 1911.

Broŝuro pri monaj interrilatoj.

3 h. *Raporto pri la junula fako* (F. Rockmann).

Fondo de Esperantiaj sekcioj en la gimnazioj (Th. Rousseau).

Konsulinoj por virinoj (Ilia celo kaj tasko).

Dimanĉo 31 Julio

Ekskurso.

Lundo 1a Aŭgusto

9 h. 1/2. *Raporto pri la komerca fako* (Dro Kandt).

Servoj por la Esperantiaj Entreprenoj (regularo pri informpetoj, nacilingvaj cirkuleroj kaj demandfolioj, k. t. p.

Propono pri servo por dungado.

Propono pri varbado de internaciaj kunvenoj kiel.

Esperantiaj Entreprenoj (P. Linares).

Disdonado de reklamiloj (Stromboli).

Listo de firmoj Esperante korespondantaj.

3 h. *Broŝuro pri poŝtaj reguloj* (Th. Rousseau).

Reformo de l'kalendaro.

La Mono-formato kaj ĝiaj aplikoj.

Komercaj gvidfolioj.

Diversaj proponoj.

Mardo 2 Aŭgusto

9 h. 1/2. *Raporto pri la turisma fako* (J. Schmid).

Gvidfolioj kaj gvidlibroj. (Celo kaj diferenco.)

Libertempaj kolonioj kaj hoteloj.

Junulaj Karavanoj.

Broŝuro pri la fervojaj reguloj.

Sporto (Fondo de sportaj societoj. Ekskursoj; sportaj konkursoj).

3 h. *Legado kaj alpreno de la Kongresaj deziresprimoj.*

Fermo de la Kongreso.

⁂

La raportoj pri la ĉefaj temoj esplorotaj de la Kongreso estos presataj kaj disdonataj al la Kongresanoj en Augsburg.

La Vesperoj

La listo de la festoj aperis en nia lasta no. Ni ripetas ĝin : *Jaŭdo 28 vesp.* Festeno de U. E. A. Amuzaĵoj en hotelo 3-Mohren. *Vendredo 29 vesp.* — Veturado al Hocha-

---

FELIETONO DE « ESPERANTO »

9

LA KATO

de Dro Johano RAJBERTI

La Kato havas la lipharojn, kaj en tio ĉi oni ne povas nei ke ĝi estas bone imitita de la viroj, eble ja tial ke ĝi estas afero en si mem tute sensignifa. Sed kontraŭe ne mankas multaj personoj, cetere respektindaj, kiuj montras nevenkeblan antipation al tiu kutimo, kaj estas kapablaj malŝati junulon nur tial ke li lasas kreski al si la vangharojn. Ili estas malpravaj. Bona paro da lipharoj kiel ajna parto de fortika barbo, estas elementoj de vireca beleco kaj estas afero senkulpa ilin kulturi kaj havi pro ili plezuron, same kiel pro ia alia naturdonaco. Ke iomete da vanteco kaj da malseriozeco povu kaŝiĝi sub tio ĉi estas ankoraŭ la plej malgranda el la malbonaĵoj. Kiu estas severa kaj netolerema rilate al la plej kompatindaj homaj sengravaĵoj, fariĝas malaminda kaj lia vorto perdas ĉiun efikon ankaŭ kiam ĝi batalas la verajn socialajn malbonaĵojn. Kion vi dirus, pri iu kiu ĉasonte la lupojn perdus sian tempon pri la muŝoj? Tiel malmultaj estas la aĵoj kiujn la homoj povas fari aŭ ne fari laŭ sia plezuro, sen konsciencriproĉoj kaj sen kontraŭstaro, kaj ni estus tiel maldiskretaj malpliigi ilian nombron? La lipharoj ne malhelpas esti la floro de la honestaj homoj aŭ la floro de la geniuloj. Nu, vi ĉiuj kiuj estas nek profesoroj de katedro, nek magistratoj, nek kuracistoj, nek tro sindonaj, nek ligitaj pro dependeco aŭ oportuneco al la kaprico de tiu ĉi aŭ de tiu, lasu ja kreski viajn lipharojn kiel vi volas kaj povas, tiom pli ke tiu milita insigno ne vin devigas fari fanfaronaĵojn nek akcepti duelojn, nek savi la patrujon minacitan. Estas efektive belaj kaj longaj la lipharoj de la Kato, tamen ĝi pro tio ne opinias sin devigata afekti bravecon, eĉ saĝe ĝi estas malkuraĝa, kaj dum la danĝeroj sin kaŝas kaj rapidege forkuras de la hundo kaj ĉiam estas tute preta al iu ajn malkuraĝaĵo por savi sian karan haŭton.

La Kato en siaj elfaloj havas la virton ĉiam fali sur la piedetoj. Provu ekkapti iun ankaŭ junan kaj senspertan : ĝin sublevu kun la ventro alten, poste ja lasu ĝin fali neatendite el la alteco da nur kvar coloj : tiu mallonga spaco sufiĉas al ĝi por fari rapidege duonturniĝon ĉirkaŭ propra akso kaj fali sur la piedetoj.

Ni, male, kutimas fali mallerte kaj pli ofte kun la kapo teren, kvazaŭ la kapo estus la parto malpli nobla de la multepeza estaĵo. Sed se la homoj estas fizike nekapablaj fali sur la piedoj, estas multnombraj kiuj estas tiom pli lertaj *fali starante* laŭ la metafora kaj proverba senco de la frazo, ekzemple en la komercaj krizoj. Mi citas nur unu ekzemplon meze de mil.

Iu bankrotinta, kiu forkuradis kun sufiĉaj rimedoj por vivi honeste sub alia ĉielo, lasis la patrujon ekkriante : « perdi la ŝatecon kaj la honoron, pacienco : ili estas ideoj; sed ni savu almenaŭ la personon kaj la monon, kiuj estas aĵoj ». Tiu fripono falis starante.

Kaj ĉar ni aludis tiajn virtojn, diru al mi konfidencie : ĉu vi iam intencus imiti la Katon ankaŭ en ĝiaj rabemaj ungoj? Mi vin malkonsilas kore, sed kiam ja vi estus decidintaj al tio ĉi, bone rimarku esencan cirkonstancon; ĝi estas ke ĝiaj ungoj estas kuntireblaj kaj ordinare kaŝitaj for de la vido kaj eĉ de la palpado. Ne sufiĉas, miaj karaj, lasi kreski al si la ungojn kiel la modo ordonas; tio nur taŭgas por ungoskrapi la amikojn kiam oni premas al ili la manon. Ekkaptu ja la piedeton de la Kato : ĝi estas tute delikata, velura, karesema; la ungoj ekzistas kaj akraj kaj fortaj sed ili aperas nur en la momento de l'bezono. Ĉu vi komprenas? Se vi ne kaŝas la ungojn vi ne povas esperi tuŝi tiujn kapitalojn por viaj negocoj aŭ tiun administracion : fine tiun ajn cirkonstancon fari agi iomete kiel la Kato.

Se tamen, iu sentus konsciencriproĉon ke li lasis ekvidi la ungojn pro tro multe da nesingardo, ne senkuraĝiĝu pro ĉi tio : ĉar ĉiu regulo havas siajn esceptojn. Nur en ordinara maniero la Kato kaŝas la ungojn, sed de tempo al tempo ĝi sursaltas sur viajn genuojn kun mirinda naiveco, por ilin akrigi en viaj vestoj, kaj se vi ne forpelas ĝin, eĉ en via haŭto. Miru iom kia kuraĝega tentanto de via toleremo kaj precipe, kia spirita besto! Mi vetas Perseon kaj Juvenalon fari pli viglan satiron al la societo ne mem sinsekvanta kaj malsaĝa kiu tiom da fojoj obstinas protekti tiun kiu senhonte ĝin mokas.

Ho! la aferoj marŝus malbone por la friponoj, se iam konitaj kiel tiaj, ili estos por ĉiam senigitaj je tiu konfido kiun ofte oni neas al la honestuloj. Tiam, mi demandas, kiel ili faros por senigi unu papilon post la alia, bankroti la duan fojon kaj la trian; fine fiŝkapti la tutan vivon en la maroj neelĉerpeblaj de la maldiligenteco, de la kredemo, de la malklereco de la aliaj? Nu per la ungoj oni bezonas uzi singardon kaj samtempe maltimon; ĉar aŭ kaŝataj aŭ malkaŝataj ili ĉiam taŭgas por rabi.

Sed kaŝu ni tiajn serĉojn kiuj povus esti misinterpretitaj. La Kato posedas tiun alian kvaliton : karesita kontraŭ la haro, ĝi elradias lumon, kiel oni povas observi en la mallumo. Nu, ĝi, ŝajne tiel malvarma, posedas la tutan fajron kiu liberiĝas pro la kontraŭagoj. La samo okazas ĉe la homo al la estaĵoj tro feliĉaj kaj kutimintaj vidi ĉion marŝi laŭ iliaj deziroj. Ne estas granda virto esti agrablaj, trankvilaj kaj pacemaj meze de la riĉaĵoj, de la konkeroj, de la honorsignoj, ĉirkaŭitaj de obeo, de laŭdoj, de respekto, ĉiam ĝentile karesitaj ĉe la haro. Por koni, kia fajro de malbonaj pasioj estas entenita en ili, sufiĉas ilin froti momente laŭ mala direkto. Provu iomete anstataŭ ilin glatigi de la kapo al la piedoj kun triviala flatego, resupreniri en ili de la koro al la kapo kun supreniranta epigramo, kaj vi vidos kiajn vulkanajn elŝputojn de malhumileco, malamoj kaj venĝoj.

Mi jam rimarkigis pri la kutima silentemo de la Kato, por ĝi kaŭzo de ŝatateco, trankvileco, sendependeco. Rigardu iom tiun malsaĝan hundon : ĝi bojas al ĉiuj ne konataj kaj pro la plej malforta bruo; pro tio la homo ĉiam maldiskreta krom tiom da aliaj metioj, igas lin pordisto, gardisto, spiono. La Kato parolas nur kiam ĝi bezonas por malfermiĝi al si pordon, pro doloro, pro erotikaj ekscitoj, pro malsato. Pri la virto silenti konvenus skribi multvaloran traktaton. Tie ĉi sufiĉas citi unu solan fenomenon de la homa koro. Inter du personoj novaj, el kiuj unu parolas multe kaj bone, kaj la alia tute silentas, la dua imponas multe pli da respekto. Ĉar la unua estas malfermita libro, malfadita komerĉaĵo, kies valoron vi konas; la homo estas via. Sed la silentema estas problemo solvota, li invitas la scivolemon, vi ne scias kiamaniere lin trakti, nek kiel li akceptos viajn opiniojn; pro tio li tenas vin en ĝeno kaj estas kvazaŭ timigilo. La malsaĝuloj kiuj ordinare estas la plej vantaj kaj enuigaj babilemuloj, kiom gajnus ĉiam silentante! Tiuj el ili kiuj pro troa malakreco de la inteligento praktikas ĉi tiun nean virton, fine estas taksitaj de la plejmulto kiel rispektindaj personoj. La silento estas la plej bona kovrilo de la malklereco; ofte ĝi prosperas ĝis interŝanĝigi kiel saĝeco.

Plie okazas tre malofte ke la silento naskiĝu penton; sed sola vorto multfojojn decidis la malfeliĉon de la tuta vivo, multaj aliaj kostis la vivon mem. Por la Kato ne ekzistas tiaj perikloj : kvankam ĝi silentas por la sola motivo ke paroli sen bezono estas neutila penado. Kiom da saĝo! Kaj pro tio ĉi kiom estas meritita kaj inda ĝia feliĉo! Trad, A. Tellini. (*Daŭrigota.*)

blas. Koncerto kun iluminado kaj fajra artajo.

Dimanĉo 31. — Ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuchwanstein.

Lundo 1 vesp. — Varieteo kun balo.

Mardo 2. — Ĝardena festo en la urba ĝardeno kun koncerto kaj iluminado.

Krom tio okazas *sabaton vespere* granda publika kunveno pri la *celo kaj sociala signifo de U. E. A.*, kun diversaj oratoroj (Ed. Privat, Bolingbroke Mudie, H. Hodler, k. t. p.)

Ni rememorigas, ke la kosto de la ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein estas entenata en la kuponaro.

Rapidu sendi vian aliĝon por la Kongreso de U. E. A. (aliĝilo sur paĝo 3a).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

OFICIALA INFORMILO

ADMINISTRA FAKO

Diversaj avizoj.

∴ La *Oficiala Bulteno* (No 7) estos sendata je la komenco de julio. Ĝi koncernas precipe la balotadon de *distriktaj Delegitoj*, laŭ § 20 bis kaj 20 ter de la Statuto.

∴ Ni rememorigas, ke la 2a serio de la *Oficiala Jarlibro* aperis antaŭ nelonge.

∴ Ni insiste petas niajn Del. : 1e) ke ili ĉiam skribu la nomojn de la membroj sur *membrolistojn* (ne sur poŝtkartojn aŭ mandatkuponojn!); 2e) ke ili sur sia membrolisto ne ripetu la nomojn de la membroj skribitaj sur antaŭa listo, sed skribu nur la *novajn* aliĝantojn; 3e) ke ili subskribigu la aliĝilon al ĉiu nova membro; 4e) ke kalkulo estas malfermata *nur* al Delegitoj (ne al Subdel.) kaj ĉiuj aliaj personoj devas aŭ mendi per sia loka Del., aŭ kunsendi la monon samtempe kun la mendo.

Novaj Delegitoj.

Ĝis la 5. junio, la jenaj Delegitoj estis elektitaj :

Bensheim (Sud.-Okc. Germanujo). — S-ro Hans Sengerob.

Boston (Nord-Or. Usono). — S-ro F. G. Harrisson, 15, Prospect Str. Everett.

Breda (Nederlando). — S-ro J. Bal, komizo ĉe la fervojo.

Brno (Moravio). — S-ro v. Odlozilik, 38, Giskrova.

Buffalo (Or. Usono). — S-ro Russell Johnston, 228 Hayt St.

Burg (Centra Germanujo) — S-ro H. Beyer, instruisto (Subdel. dep. de Magdeburg).

Burriana (Sud.-Or. Hispan.) — S-ro J. Fenollosa (Subdel. dep. de Valencia).

Ciudad Real (Centra Hispan.) — S-ro B. M. Gomez Otero, Direccion del Cadastro.

Curlewis (Aŭstralio). — F-ino Bennett, « Duraba ».

Digoin (Burgonjo). — S-ro N. Wissen, rue du Thureau Jaune.

Hiraklion (Grekujo). — S-ro J. Serkedakis, dir. de « Kriti ».

Kamarov (Bohemujo). — S-ro B. Zadak, instruisto.

Keighley (Norda Anglujo). — S-ro Ellis, advokato, Bow St.

Kotka (Finlando). — S-ro E. W. Hykkyra.

Linares (Suda Hispanujo). — S-ro N. Gonzalez, Str. Virgen, 2.

Litavel (Moravio). — S-ro K. Urban, profesoro.

Mantilla (Suda Hispanujo). — S-ro J. L. Cabello (Subdel. dep. de Cordoba).

Puente Genil (Suda Hispanujo). — S-ro M. Maceiras Puyot (Subdel. dep. de Cordoba).

Raleigh (Sud.-Or. Usono). — S-ra D-ro A. Rudy.

Scharwonde (Nederlando). — S-ro P. Zuidscherwonde (Subdel. dep. de Amsterdam).

Sevilla (Suda Hispanujo). — S-ro Trinidad Soriano, Castallar, 30.

Shelton (Okcid. Usono). — S-ro J. R. Bennett, reverend.

Sopron (Hungarujo). — S-ro P-ro de Zsigmond, Balfi-u, 49.

Stavropol (Kaŭkazo). — S-ro F. Maurin, Aleksandrovskaja, dom. Mikeladze.

Sydney-Christchurch (Aŭstralio). — S-ro W. Weston (Subdel.)

Sydney-Woollahra (Aŭstralio). — F-ino E. Scheidel, Moncur St. (Subdel.)

Sydney-Manly (Aŭstralio). — F-ino E. M. Andrews, Beryl, Pine Str. (Subdel.)

Villeneuve-sur-Lot (Sud-Okcid.-Francujo). — S-ro G. Gase, Union Villeneuvoise.

Wassy (Orient. Francujo). — S-ro L. Hurynowicz, 32, rue Nationale.

Wernigerode (Centra Germanujo). — S-ro W. Neurath.

Zeletova (Moravio). — S-ro J. Komenda (Subdel. dep. de Kukleny).

Entute 891 lokoj.

ŜANĜOJ. — Aachen : La Del. estas nun S-ro V. Pinagel, 38, Lutticherstr. — Antwerpen (Anvers): La Del. estas nun S-ro O. Van Schoor, Vondelstraat, 20. — Bruxelles : La Del. estas nun S-ro F. Matthieux, 49, Marché aux Poulets. — Bukarest : Anstataŭ Sro Haimsohn, Sro J. Kaufmann, Fundatura Sticlari, 3 estas del. La alia Del. estas Sro E. Nicolau, Str. Decebal, 5. — Caen : La Del. estas nun S-ro Spicq, 43, rue Saint-Sauveur. — Chemnitz : La Vicdel. estas S-ro H. Leupold, Blankenauerstr. 10. — Cherbourg : S-ro D-ro Le Duigon, 36, rue de la Fontaine, restas Del. ; S-ro Ragondet, 1, rue de l'Alma, fariĝas Vicdel. — Corinba : La Del. estas nun S-ro E. Elysen, Str. Corpo de Deus, 50. — Debreczen : La Del. estas nun S-ro P. Torok, Mesterutca, 137. — Duisburg : La Del. estas nun S-ro J. Plos, 111, Kaiserstr. — Dusseldorf : La Del., S-ro Luis, loĝas nun Westenerstr., 28. — Le Havre : Pro transloĝiĝo S-ro de Coninck estas anstataŭata de S-ro E. Gasse, 55, rue Frédéric Bellenger. — Levallois-Perret : La Del. estas nun S-ro A. Louvet, 15, rue Chevallier. — Meaux : La Del, estas nun S-ro Ed. Braucourt, 29, rue du Tau. — Melitopol : S-ro A. Lenkeviĉ, Gorodskaja Uprava, refariĝis Del. — Mœrs : La Del. estas nun S-ro W. Hausmann, Rheinbergerstr., 17. — Riga : La Del., S-ro W. Ŝmurlo, loĝas nun Krebsstr. 11. — Savannah : La vicdel. estas S-ino Bayle, 326, Barnard St. — Siena : S-ro M. Cambi, via Fiorentina, 44, estas nun Del. — Stavanger : La Del. S-ro V. Petersson, loĝas nun Karlsmindergat. 16. — Stirling : La Del. estas nun S-ro Molaren, c/o The Charring Cross Bank, 64, Port Str. — Temesvar : La Del. estas nun S-ro A. Bambach, E. Stephaniautera, 2. — Oni forigu el la Jarlibro la jenajn lokojn : *Draguignan, La Ricamarie, Pont Audemer*, kie ne plu estas Del.

ESPERANTIAJ ASOCIOJ

Essen-a/-Ruhr. — *Esperanto Grupo.* P. : Pillath ; F. Krupp. Adr. : Eichelhardt 4.

Genova. — *Esperanto-Unuiĝo.* P. : D-ro A. Stromboli ; VP. : P. Dainell ; S. : T. Zilliken : K. : E. Bologna. Adr. : Via Cairoli, 39.

Stockholm : *Grupo Esperantista.* P. : P, Nylen ; S. : H. Josefson. Adr. : Agnegatan. 27.

Entute 27 Esperantiaj Asocioj.

ESPERANTIAJ ASOCIOJ

Lyon. — *Hotelo des Archers* ; Posedanto : Ch. Monnier. Adr. : rue des Archers.

Lyon. — *Contentieux Lyonnais* ; Dir. : Emile Borel. Adr. : Rue Neuve, 32.

Lyon. — *Café-Brasserie, Restaurant de la Régence* ; Posedanto : J. Kneffli. Adr. : 9, place Bellecour ; 20, rue Gasparin.

Paris. — *Grand-Hotel du Globe* ; Posedanto : Leclerc. Adr. : 71, rue Monge.

Samos. — *Esperanta Societo* ; P. : D-ro Stamatiadis. VD. : D-ro Ramfos ; D-ro Malis ; S. : D-ro Fokos ; K. : S. Limperis.

Schweidnitz. — *Librejo Joh. Zuckschwendt*; (Kaisers Buchhandlung). Adr. : Markt., 32, Schweidnitz (Bavarujo).

St-Gravenhage (Haag). — *Societo Anonima « Espero »*; (Ĝenerala kaj Esperanta Librejo). Dir. : J. L. Bruijn. Adr. : Prinsestraat, 48.

Sydney. — *Zamenhofa Esperanto-Klubo* ; P. : Watson ; S. : F-ina Rayson. Adr. : Kensington ĉambroj, Moore St.

Sydney. — *Esperanto Klubo* ; P. : A. H. Stevens ; S. : H. Ormtsby. Adr. : Y. M. C. A.

Sydney. — *Woollahra Ep. Klubo* ; S. : F-ino E. Spencer. Adr. : Woollahra Lodze, Moncur St.

Sydney. — *Christchurch Esp.-Grupo* ; P. : R. Beattie ; S. : W. Weston. Adr. : Christchurch, St-Lawrence.

Sydney. — *Gildo de Esperantaj Teozofoj* ; P. : T. H. Martyn ; S. : B. G. Watson. Adr. : Kings Hall, 132.

Troyes. — *Esperantista Grupo* ; P. : Doré ; VP. : Tabouret ; S. : Roussel.

Vladivostok. — *Societo Espero* ; P. : Neoupokojev ; S. : Elleder, Dki Rebrov. Adr. : Svetlanskaja, Morskoje Utchilisĉe.

Entute 154 Esperantiaj Entreprenoj.

FINANCA FAKO

Bilanco de U. E. A. je la 1a de junio 1910

Al la centra kaso U. E. A	*Ŝuldoj*
Oficejaj elspezoj (Salajroj, lupago, poŝtelspezoj, k. t. p.)	170 32
Presajoj	110 22
Elspezoj de Fakestroj	19 37
Diversajoj	6 03
	305 94
De la centra kaso U. E. A.	*Havas*
Kotizajoj	72 »
Esperantiaj Entreprenoj	32 »
Donacoj	13 18
Venditajoj	118 75
Diversajoj	1 50
	237 43

Kredita suldo la 1an de junio Sm. 1.527 22

La Financa Fakestro,
Th. Rousseau.

TURISMA FAKO

Gvidfolioj.

Lastatempe gvidfolioj estis eldonitaj en la jenaj regionoj : *Pleven, Cordoba, Marseille, Moskvo, Prostejov, Portsmouth, Roznov, Hannover, Poitiers, Vladivostok, Gap, Sens, Paris.*

Ekzistas nun kvindeko de tiuj gvidfolioj.

Ni informas, ke la mencio « publikigita sub la aŭspicioj de U. E. A. » povas esti almetita nur post kiam la manuskripto estis oficiale *aprobita* de U. E. A. kaj nur se la gvidfolio estas presata laŭ Mono-formato.

JUNULA FAKO

Servoj de la junula fako.

La Delegitoj kaj speciale konsuloj por junuloj estas petataj diskonigi la ĉi-subajn petojn al la Esperantianoj de sia regiono kaj afiŝigi ilin ĉe la Esperanto-Oficejo.

Mallongigoj.

Adr. : adreso, Al. : dez. veturi al. T. : tempo. O. : okupo. K. : kondiĉoj. R. : Rimarkoj.

Junuloj, dezirantaj forveturi eksterlanden.

51. F-ino A. Preis, 22-jara, instruistino. Adr. : S. Sander, Bennostr., 3., Hannover (German.) Al. : en aŭ eksterlanden. T. : 1 7 ĝis 1/8. O. : instruado de angla, franca, Germana, Esp. aŭ akompano dum vojaĝo. K. : laŭ interkonsento.

52. S-ro W. Holst, stud. 21-jara. Adr. : Friedrichstr., 62, Halle a/S. (Germanujo). Al. : Anglujon. T. : Aŭg-Okt. O. : instrui la Germ. franc. ital. Esp. kaj antikgrek. kaj hebrean lingvojn.

Junuloj, dezirantaj korespondi.

53. P. Zverev, kaditskij korpus. — 54. Stepanov, Seminarskaja gora 14. — 55. Magilevskij, Padjaĉenskaja, 28. — 56. Podlevskij, Brinkmanskaja ul. — 57. Pravrilov, Sobornaja gora 8-ĉiuj en *Voronej* (Rusujo).

◆

Esperantiaj Informoj

Ĉe la Centra Oficejo de U. E. A.
Movado de la Korespondajoj

Jen la etato de la movado de la korespondajoj (ricevitaj kaj forsenditaj) ĉe la Centra Oficejo de U. E. A. dum la lastaj ses monatoj. Tio, pli trafe ol detalaj klarigoj, montros la gravecon de la laboro, kiun necesigas nia Asocio.

Monato	U. E. A.	Librejo	Sumo
Decembro 1909	1.079	626	1.705
Januaro 1910	1.182	414	1.596
Februaro	1.191	413	1.604
Marto	1.988	572	2.560
Aprilo	1.187	560	1.747
Majo	1.650	844	2.494
			11.706

Tio estas proksimume 2.000 korespondajoj monate. Se al tiu cifero oni aldonas la korespondajojn interŝanĝitajn inter delegitoj aŭ inter Delegitoj kaj membroj — verŝajne pluraj miloj — oni havos ideon pri la laborado efektivigata inter de U. E. A.

◆

VARIETEA MONDO

Al niaj membroj kaj konsuloj

En la monato Junio okazos en *Berlino* la ĉi-tiu jara ĉefkunveno de V. E. L. La provizora tagordo enhavos jenajn punktojn :

1a Raporto pri la paŝinta societa jaro kaj pri la stato de l'kaso.

2a Deŝarĝigo de l'ĝisnuna estraro.

3a Elekto de l'estraro por la jaro 1910.

4a Aprobo de l'regulara projekto, proponita de l'estraro.

Ni petas ĉiujn liganojn kaj konsulojn, ke ili kiel eble plej multenombrege partoprenu nian unuan ĉefkunvenon.

Plue ni informas niajn konsulojn, ke *dum la kongreso de U. E. A.* okazos ankaŭ kunveno de konsuloj de V. E. L. en kiu oni pritraktos kelkajn gravajn priligajn demandojn. Tial ni petas kaj esperas, ke kiel eble plej multaj konsuloj ĉeestu.

Laŭ komisio de l'estraro :

La Ĉefsekretario.

⁂

Nekrologio

Antaŭ kelkaj tagoj mortis en Hamburgo Ferdinand Delkliseur, famkonata reprezentanto de l'artistaro, kiu precipe per sia talento kiel improvízisto ĉie estis konata kaj ŝatata.

En la lasta tempo Delkliseur interesiĝis ankaŭ pri la esperan-lingvo kaj V. E. L. En komenco de ĉi-tiu jaro li aniĝis al nia ligo kaj fariĝis konsulo en Frankfurt-s-M. Kvankam li nur mallongan tempon apartenis al nia ligo, tamen lia morto estas grava perko kor V. E. L. La estraro kaj ĉiuj liganoj danke konservos en si la memoron pri lia nomo.

K. B.

La unua Kongreso de U. E. A. (por Eŭropo) okazos en Augsburg (28 Julio-3 Aŭgusto 1910).

STATISTIKAJ NOTOJ

Etato de la Esperantianaro

Jen la etato de la Esperantianoj, ordigita laŭ la landoj. Inter krampoj ni notis, por la ĉefaj landoj, la ciferon de la membroj je la 1a de novembro 1909, t. e. antaŭ 7 monatoj :

1	Germanujo	1479 (900)	15	Bulgarujo	93
2	Francujo	1342 (1026)	16	Rumanujo	87
3	Rusujo 1)	985 (571)	17	Belgujo	73
4	Anglujo	759 (616)	18	Portugalujo	41
5	Hispanujo	512 (413)	19	Danujo	40
6	Aŭstrio	387 (288)	20	Venezuelo	35
7	Aŭstralio	194 (74)	21	Meksikujo	21
8	Holando	180 (105)	22	Serbujo	18
9	Usono	170 (138)	23	Grekujo	17
10	Italujo	169 (60)	24	Kubo	12
11	Svisujo	166 (166)	25	Argentino	12
12	Brazilujo	116		Aliaj landoj	28
13	Svedujo	102			
14	Turkujo 2)	97		Sumo	7.135

Laŭ kontinentoj la apartigo estas jena :

Eŭropo	6.306	(4.497)
Ameriko (Nordo 218 / Sudo 174)	387	(154) (104)
Oceanio	209	(77)
Azio	179	(65)
Afriko	54	(28)

Oni rimarkos, ke la vico de la unuaj landoj, kiu antaŭ 7 monatoj estis : Francujo, Germanujo, Anglujo, Rusujo fariĝis : Germanujo, Francujo, Rusujo, Anglujo. La nombro de la membroj pli ol duobliĝis en Aŭstralio kaj preskaŭ triobliĝis en Italujo.

⁂

Je la 1a de Junio estis 120 regionoj, kie estas pli ol 20 membroj. Jen estas la listo de tiuj regionoj kun la nombro de la membroj 3).

1	Moskvo	181	35	Boston	30
2	Augsburg*	160	36	Teruel	29
3	London	133	37	Helsingborg	28
4	Paris	129		Hull	28
5	Danzig*	126		Colorado	28
6	Dresden	85		Angers	28
7	Bromberg*	83		Newcastle	28
8	Irkutsk	77		Villemomble	28
9	Praha	72	38	Bradford	27
10	Stuttgart*	70		Breslau	27
	Sydney	70		Dijon	27
	Magdeburg	70		Hannover	27
11	Berlin	68		Hyères*	27
12	Varsovio	67		Lvov	27
13	Kiew	66	39	Lodz	26
14	Abbeville*	63		Kovno	26
15	Amsterdam	54		Saint-Etienne	26
16	Liverpool	53	40	Bruxelles	25
17	Grenoble	52		Hamburg	25
18	München*	50		Kœln	25
19	Alger	48		Kopenhag	25
	Beaune	48	41	Nice	24
	Kœnigsberg	48		Le Mans	24
	Tiflis	48		Le Creusot	24
20	Gijon-Oviedo	46		Halstead	24
21	Sosnovice	44	42	Pleven	23
	Sabadell	44		Trieste	23
	Edinburgh	44	43	Samos	22
22	Vœrishofen*	43		Marseille	22
	Düsseldorf	43		Worms	22
23	Genova*	42		Firenze	22
	Rio-de-Janeiro	42		Aïdin	22
	Voronej	42	44	Barnaul	21
	Gravenhage	42		Godesberg	21
24	Kostroma	41		Bendzin	21
25	Leipzig	40		Douai	21
26	Radebeul	39		Frankfurt	21
27	Krakow	38		Maitland	21
	Bukarest	38		Sofia	21
28	Dublin	37		Rouen	21
29	Cartagena	36	45	Savannah	20
	Barcelona	36		Sao Paolo	20
30	Caracas	35		Palermo	20
31	San Sebastian	34		Schweidnitz	20
	Valencia	34		Nazli	20
32	Rostov	33		Nuits	20
	Invercargill	33		Nottingham	20
33	Manchester	32		Neuchâtel	20
	Lyon	32		Nancy	20
	Le Havre	32		Louhans	20
	Cordoba	32		Madrid	20
	Amiens	32		Haarlem	20
34	Smyrne	31		Eskiltuna	20
	Zaragoza	31		Davos	20
35	Genève	30		Burnley	20
	Bilbao	30		Braunschweig	20
	Melbourne	30		Bordeaux	20

---

1) Kun Finlando kaj Siberio.
2) Eŭropa kaj Azia.
3) La steleto (*) montras la Esperantiajn Asociojn.

REKLAMO

TARIFO

Unu paĝo	₷ 240	*1/8 kolono*	₷ 5
Unu kolono	40	*1/16 —*	2.50
1/2 —	20	*1/24 —*	1.75
1/4 —	10		

Rabato da 10 % por 3 reklamoj, 25 % por 12 reklamoj ; 50 % por 24 reklamoj. Nenia alia rabato aŭ prezo konsentata.

Sin turni al la *Administrejo*, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo) aŭ al la *ĝeneralaj agentoj* : G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris* ; Presejo de Esperanto, 15, rue Amiral Roussin, *Dijon* (Francujo) ; C. kaj G. Browne, Wellington St., Strand, *London* (Anglujo) ; Germana Esperanto-Librejo, Sternwarte, *Leipzig* (Germanujo) ; Traduka Oficejo, 6 Schleinitztr, *Bromberg* (Germanujo) ; Librejo Saĥarof, Tverskaja 29, *Moskvo* (Rusujo).

ESPERANTO *estas la plej bona internacia reklamilo por ĉiuj komercistoj, industriistoj financistoj, aferistoj,*

Ĉar ĝi estas la plej legata el ĉiuj Esperantaj gazetoj,

Ĉar ĝi havas legantojn en 44 landoj de l'terglobo,

Ĉar ĝi estas la oficiala organo de U. E. A. kaj estas uzata de ĉiuj Delegitoj, Konsuloj, Esperanto-Oficejoj.

Ĉar ĝi estas gazeto, kiun oni zorge konservas, kies ĉiun numeron legas ne unu persono, sed multaj, ĉe la kursoj, grupoj, k. a.

AVIZO. — La Administrejo serĉas en ĉiuj lokoj bonajn reklamo-makleristojn. Oni sin turnu al ĝi pri la kondiĉoj kaj pluaj informoj.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — *Unu enskribiĝo* ₷ *0.30 (fr. 0.75).*

Pl = *poŝtkartoj illustritaj* ; L = *leteroj* ; PM = *poŝtmarkoj.*

Petoj & Proponoj ; Komercaj reklamoj. — *Unu linio 40 literoj :* ₷ *0.15 (fr. 0.40).*

Por ĉiuj anoncetoj, rabato da 10 % por 3 enpresoj, 25 % por 12 enpresoj, 50 % por 24 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtas unu enskribiĝon por korespondado aŭ duliniananoncelonsenpage.

NOTO. — Ĉia anonceto estos sendata, antaŭ la 5a kaj 20a de ĉiu monato, al nia Administrejo, al la lokaj Agentoj aŭ Esperanto-Oficejoj. Pago per poŝtmandato aŭ internaciaj poŝtkuponoj.

Korespondado

Vitkovice (Moravio). — Sro Dro Josef Jerencina, Paskovskaul, 417. Pl.

Vitkovice (Moravio). — Sro Aug. Martinik, Josefinska Kolonic, 613. Pl.

Vilno (Rusujo). — Sro A. S. Juhnewiĉ, str. Sergevska, d. 12, loĝ. 9, kun ne Eŭropanoj. Pl. PM.

Zaragoza (Hispanujo). — Sro Cesar Torres Ordan, Delegation de Hacienda, Pl. kun Orientaj Virinoj.

Gerona (Hispanujo). — Sro Mariano Rodriguez, Constitucion, 7. Pl. PL.

Rodniki (Kostroma gub, Rusujo). — Sro N. Baskakov, gimnaziano de l'7-a klaso. Pl.

Kostroma (Rusujo). — Sro L. Tjukalov, gimnaz. de l'7-a klaso, str., nikitska, 22, Pl.

Vetluga (Kostroma gub. Rusujo). — Sro N. Uspenskij, gimnaziano de l'7-a klaso, loĝejo de Ĉlena Okrujnogo Suda. Pl.

Kostroma (Rusujo). — Dek knabinoj el la fabrikaj kaj urbaj lernejoj. Skribi al F-ino A. Ŝarapov, 13 str. Mŝanska. Pl.

Esperanto-Movado

The British Esperantist (No 65, majo 1910).

Paroladoj : Sutton, S-ro A. Honeysett ; Burnley, S-ro W. B. Currie ; Leeds, S-roj Hudson, Witley, Maréchal kaj Hedley-Ince ; Manchester, S-ro Walter ; Plymouth, S-ro G. Y. Cox (2).

Kursoj : Sutton, Halifax, Huddersfield.

Franca Esperantisto (No 7, majo 1910).

Paroladoj : Serre, S-ro Drudin ; Tours, S-ro Grosjean ; Paris, S-ro Carlo Bourlet.

Kursoj : Abbeville, Andruicq, Saint-Denis.

La Kongreso de Federacio Esperantista de Centra Okcidento de Francujo okazis en Orléans dum Pentekosto. Grupo de Tournus ricevis subvencion de la loka urbestraro da 40 fr.

Le Monde Espérantiste)No 6, majo, 1910).

En Houilles fondiĝis nova grupo, nomata : « Fidela Stelo ». En Saint-Germain-de-Bois, S-ro Maublanc faris paroladon.

La Urbestraro de Limoges per la loka Esp. grupo sin turnis al la tiea del. de U. E. A., petante de li ke li petu ĉiujn lokajn del. de U. E. A. konigi al la muzikistaj societoj pri la okazonta konkurso de muziko en Limoges. Ni ricevis la cirkuleron senditan de la Limoges' a del. kaj atentigas pri tio nian legantaron, por ke en lokoj, kie ne ankoraŭ ne ekzistas U. E. A. delegitoj, ili faru la necesajn klopodojn, por transdoni la inviton al la konkurso al iliaj lokaj muzikistaj societoj. Por ricevi detalajn informojn pri tiu konkurso oni bonvolu sin turni al S-ro L. Lamant, sekr. de la Esperantista Grupo, Del. de U. E. A., 47, avenue du Pont-Neuf. Limoges. Francujo.

Germana Esperantisto (No 5, majo, 1910.)

Paroladoj : Bromberg, S-ro D-ro Kandt ; Charlottenburg, S-ro Behrendt ; Cottbus, S-ro Wichert ; Dormund, S-ro Zimmer ; Dresden, S-ro Johannes Heyn ; Elberfeld, S-ro Gottlieb ; Leipzig, S-roj Schlaf, Heyn ; Radebeul, S-ro Lohmann ; Rostock i. M. S-roj Bork, Bergmann ; Schweidnitz, S-ro Prof. D-ro Huebner ; Zuttau, S-ro Arnhold.

Kursoj : Augsburg (2), Bautzen, Cottbus, Essen a. Ruhr, Gmünd, Grosschœnau, Krefeld, Leipzig (2).

Germana Esperantisto (No 6, junio, 1910.)

Paroladoj : Bamberg, S-ro Loy ; Braunschweig, S-ro Schlaf ; Dresden, S-ro W. Velten, S-ro Marx ; Kassel, S-ino Caspari ; Krefeld. S-roj Louis kaj Simson el Düsseldorf ; Landaŭ i. Péf, S-ro Daum ; Gommersheim, S-ro Müller ; München, S-roj Prof. P. Christaller kaj Fleck ; Rostock, S-roj Heydweiller kaj Bock ; Stuttgart, S-ro Prof. Christaller.

Grupoj : Arnstadt, Braŭnsdorf i. Sa, Cottbus, Gerrukut i. Sa, Landaŭ i. Pf., Offenbach a. M., Stuttgart.

Kursoj : Augsburg, Bonn a. Rh., Braunschweig, Bremen, Darmstadt, Dresden, Erlangen, Frankfurt a. M., Halberstadt, Hildesheim, München, Münster i. W.

Germana Esperanto-Gazeto (No 9, mojo 1910).

Paroladoj : Bromberg, S-ro D-ro Kandt ; Charlottenburg, S-ro Behrendt.

Kursoj : Bautzen kaj Burg.

Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu (aprilo 1910).

Paroladoj en : Nova Paka, S-ro K. Rochazka ; Golĉur Yenikov, S-ro K. Prochazka ; Litoméřice, S-ro Ruzicka.

Grupoj : Praha, Zizkov, Louny, Trutnov, Cerveny Kostelec, Kladno.

En Kolin malfermiĝis senpaga kurso.

De la **Centra Asocio Bohema Unio Esperantista** ni ricevis jenajn informojn :

La 1. Aŭstria Esperanto-Tago en Wien, inter kies partoprenintoj duono estis Bohemoj, decidis unanime, ke la II Tago en 1911 estu aranĝota de la Centra Asocio Bohema Unio Esperantista Praha. La « Tago » pruvis, ke sur neŭtrala lingva fundamento, konservante sian nacian individuecon, ĉiuj nacioj povas komune labori pri siaj enlalandaj taskoj, nepre komunaj al ili. Antaŭ la ekzamena komisio de B. U. E. plenumis jam 20 kandidatoj ekzamenojn pri scio de Esperanto. La II Kongreso de Bohemaj Esp.-istoj okazos la 14-15 de aŭgusto en Praha.

En Nova Bydzov estas fondita klubo.

Esperanto-Verein « Verda Stelo » organizis tri propagandajn paroladojn de S-roj D-ro A. Bischitzky kaj Lederer (2). S-ro Lederer malfermis esp. kurson.

Ruslanda Esperantisto (N. 2, 3 februaro, marto 1910).

Grupoj : Simbirsk, Ribinsk.

Kursoj : Vilno, Tiflis.

La Ondo de Esperanto (N. aprilo 1910).

Grupoj : Moskvo, Krasnojarsk.

S-ro Ciss faris sukcesan paroladon en Baku.

En Tomsk malfermiĝis kurso.

Kiel ni jam diris en nia antaŭa kroniko la 3an 8an de majo okazis en Peterburgo *unua Tutrusa Kongreso de Esp.-istoj*, kiun ĉeestis la Majstro. Ĝi estis sukceso de la rusaj samideanoj kaj por la Esp.-Movado en Rusujo. La malferman kunsidon ĉeestis 600 personoj. (Tamen oni ne povas diri, ke tio estas la nombro de la kongresanoj). Estis prezentitaj multaj raportoj, pri kiu ni ne havas la eblecon paroli. Ni montros nur la ĉefajn decidojn de la kunveno :

1. Fondi laŭ eble Esp. Instituton, laŭ la modelo de la Saksa Instituto.

2. Organizi ĉie juĝantaron de la Int. Inst. Esp. kaj kunlabori kun ĝi en tiu senco.

3. Inviti la Esp.-aron kongresi dum 1912 en Varsovio. Pri multaj aliaj decidoj ni ne parolos, ĉar ili estas nur por kaj pri la loka propagando.

En Ufa fondiĝis grupo.

Ĉe Voroneĵa Popola Universitata estas fondata Esp. sekcio. Popola Universitato donas por Esperanto-lecionoj sian loĝejon.

Oni skribas al ni el *Italujo* :

Genova Esp. Unuiĝa fariĝis Esperantia Asocio, kaj nune havas pli ol 50 membroj. D-ro Stromboli, prezidanto, faris jam kvar paroladojn kiuj vekis grandan intereson. La Urbestraro konsentis al la Unuiĝo malfermi kurson ĉe publika lernejo, kaj, kvankam la sezono ne estas tute favora pli ol 200 personoj ĉeestis la paroladon por la malfermo de la kurso kiun gvidas S-ro Stromboli. Pli ol 100 personoj de ĉiuj aĝoj kaj kondiĉoj enskribis sin al la kurso kaj sekvas ĝin kun kreskanta intereso. Baldaŭ ni havos butikojn kun la enskribo « oni parolas esperante ». La komercistaro komencas atentigi kun simpatio al nia afero.

Ni progresas tre rapide.

Kataluna Esperantisto (N. 2, majo 1910).

Paroladoj : Barcelona, S-roj Lafuente, Casajona, Borts, Vermudez, Gonzalez, D-ro Brémon (2), S-ino Pujulà ; Vic, S-roj Albinana, Pijadas kaj S-ino Sanvicens.

Kursoj : Terrassa, Sabadell (3).

Grupoj : Terrassa kaj Santa Perpetua de la Moguda.

Rumana Esperantisto [(N. 5, 6 februaro, marto 1910).

Kursoj : Bukaresto (2), Jaŝi.

Paroladoj : Bukarest, de S-roj D-ro Robin kaj D-ro Mendelssohn ; Krajovo, S-roj Fürst, Putureanu, Simion, Miluia, Al. Niculesku.

La Holanda Pioniro (N. 8, majo 1910).

Kurso en Alkmaro estis malfermita.

Grupoj estis fonditaj en Boxtel kaj Rotterdam.

Dana Esperantisto (N. 4, aprilo 1910).

En Horsens estis fondita grupo.

En *Svisujo* aperis nova ĵurnalo : *Vespera Horo*, redaktata Germane kaj France. Redakcio kaj administrejo : D-ro Uhlmann, Huttwil (Bern). Prezo Sm. 2.50.

Aldono : « Illustrierts Schweizer Heim », duonmonata gazeto.

S-ro P. Ketterer faris paroladon en Vevey.

En Chézard fondiĝis nova esp. grupo.

(El «Svisa Espero », N. 5, majo 1910.)

Nova gazeto : **Sveda Esperantisto.** Redakcio : John Lundgren, Hedemora.

En Karlstad fondiĝis grupo kaj malfermis kurso.

En Eskilstuna kaj Gæfle malfermiĝis kurso.

The Australian Esperantist aperas nun kiel parto de la ĵurnalo : « The Independent ».

En ĝi ni trovas jenajn informojn pri la movado en Aŭstralio.

Paroladoj : Ellistono, S-ro W. Lamb ; Manly, S-ro Roinel.

Kursoj : Ellistono kaj Manly.

El Rio de Janejro (Brazilujo) oni skribas al ni, ke tie malfermiĝis 4 kursoj kaj baldaŭ malfermiĝos ankoraŭ pluraj ĉe la publikaj lernejoj.

La 12-15 de majo okazis en Petropolis (Brazilujo), la IIIa Brazila Kongreso. Multaj festoj estis preparitaj por tiuj okazoj.

BIBLIOGRAFIO

Proverbaro Esperanta, laŭ la verko « Frazeologio rusa-pola-franca-germana » de M. F. Zamenhef, aranĝis D-ro L. L. Zamenhof, 1 vol., 82-paĝa ; Paris, Hachette et Cie ; prezo : Sm. 0.72.

Lingvaj Respondoj, aperintaj en *La Revuo.* Verkis D-ro L. L. Zamenhof, 1 vol., 30-paĝa ; Paris, Hachette et Cie ; prezo : Sm. 0.30.

Vortaro de Esperanto, verkita de Kabe (D-ro K. Bein), 1 vol., 175-paĝa, bindita ; Paris, Hachette et Cie ; prezo : Sm. 1.60.

Enciklopedia Vortareto Esperanta, kun klarigoj en Esperanto kaj franca traduko, verkita de Ch. Verax, 1 vol., XVIII+249-paĝa, bindita ; Paris, Hachette et Cie ; prezo : Sm. 2.40.

Marta, de Eliza Orzeszko, esp.-igis D-ro Zamenhof, Rakonto. Librairie Hachette et Cie, 79, Bd Saint-Germain, Paris ; prezo : Sm. 1.40.

Pourquoi je suis devenu espérantiste, de E. Archdeacon kun antaŭ parolo de Henri Farman. Arthème Fayard, eldonisto, 18 kaj 20, rue de Saint-Gothard, Paris ; prezo : Sm. 0.80.

Praktisches Esperanto-Lehrbuch, de S-roj P-ro M. Becker, P-ro E. Grosjean-Maupin, kaj Rudolf Sprotte, Eldonejo : Esperanto Verlag Mœller Borel, Berlin, SW. 68 ; prezo : Sm. 0.75.

Himnaro, konsistanta el cent himnoj ; kunigita de M. C. Butler. Eldonejo : British Esperanto-Association. 133-136, High Holborn, Londono ; prezo : Sm. 0.25.

La vojo al vero, de Stanislas Tomiĉ, originale verkita en Esperanto. Eldonejo ; prezo Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris ; prezo : Sm. 0.40.

S. S.

Ĉiujn jurnalojn oni povas aboni, plej gravajn librojn mendi ĉe Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève (Svis.).

Esperantianoj !

Ĉiam memoru ke, kiam vi petas servon de Delegito de U. E. A. vi devas skribi sur internacia respond-poŝtkarto aŭ sendi markon aŭ kuponon por la respondo.

⁂

Antaŭ ol forveturi por viaj someraj vojaĝoj ne forgesu mendi de la Centra Oficejo de U. E. A. kolekton de gvidfolioj (Prezo : Sm. 0.25.

Pelplin (Westpreŭssen, Germanujo). — S^ro^ M. Graŭn. Pl.

Kœnigsberg Pr. (Germanujo). — S^ro^ D^ro^ H. Michelis, Vorder-Rossgarteu. Pl.

Zaragoza (Hispanujo). — S^ro^ Angelhong'os, Teatristo, S. Pedro, Nolasco, 3. Pl.

Rybinsk (Rusujo, Volga). — S^ro^ A. Goldman. Pl.

Hugstetten (Baden, Germ.) — S^ro^ Tr. Peter. Pl. L.

Aïdin (Azia, Turkujo). — S^ro^ Emanuel Savajidis. Pl. PM.

Valencia (Hispanujo). — S^ro^ Josef Ventura, studento. Roteros, 10-12.

Budapest (Hungarujo). — S^ro^ Oladaro Neumann, V, Csaklyau 6, fsz, 6.

Manlleu (Catalunujo, Hispanujo). — S^ro^ Petro Aixala, strato Ponto, 38, Pl, ĉiam, respondas; S^ro^ Rosendo Poqui, Mas Poqui P. I tuj respondas.

Barcelona (Hisp.) — S^ro^ F. Alsina Sto Martinez de la Rusa, 25 - 2°-1^a^. Pl. P M.

Basingstoke (Angl.) — S^ro^ H. Woolgar, 58, Worting Rd., P. M.

Amsterdam (Italando). — S^ro^ N. W. Pel, v. Oldenbarneveld-Straat, 10, P. I.

Thurey (Saône-et-Loire, Franc.) — F^ino^ Châtelet P. I. L. (kun nefrancoj) tuj respondas.

Prezov (Moravio-Austr.) — S^ro^. Georgo Ministr., Osmek, 27, P. I. L. M.

Berlin (Germ.) — S^ro^ Frantz Kvitz, S. W., 48, Wilhelmstr. 122^a^ P. I.

Moskvo (Rusujo). — S^ro^ B. Fugarinov, stac. Stschelkovo, Severn. Z. D., Magazin Rubcova pri sociaj kaj aliaj demandoj P. I. L.

Rybinsk (Jaroslav. Gub. Rusujo). — S^ino^ Serkin Geta, kv. de S^ro^ Zilberberg, P. I.

Paris (Franc.) — S-ro Louis de la Berthellière, 84, rue de Cléry, ĉiam respondos. Pl.

Savannah (Ga, U. S. A.) — F^ino^ Lily, H. Emerson (9-jaraĝa), 20 West Hull st., P. I.

Rakovnik 373 (Bohem.-Austr.) — S^ro^ Hlavaček Miloŝ P. I. P. M. Li vojaĝos dum libertempo kaj povas sendi belajn p. k.

Boulogne-sur-Mer (Francujo). — S^ro^ Victor Haigneré, 149, rue du Moulin-à-Vapeur. Pl.

Petoj kaj Proponoj

JUNA ANGLO ŝtudinte francan lingvon jam de kelkaj jaroj deziras korespondi kun franca samidean(in)o nepre bona Esper. kaj se eble Universitato Studento), kiu same studas anglan lingvon, por reciproke korekti ekzercojn adresu J. H. Hodges, Del. U. E. A., 85, Longhborough Rd., Nottingham, Anglujo.

HULL. — La Delegito estas S-ro A. E. Hepton, 40, Derringham St., Eks.-Delegito F. W. Coulson translokiĝis en Skirlaugh near Hull. Korespondantoj bonvolu noti.

SPECIMENOJ. — . Mi deziras specimenojn de ĉiuj Esperantaj gazetoj, libroj, fabrikaĵoj k. c. por propagando. Adresu : S-ino E. Esther Owen, Del. U. E. A., 17, East Perry St., Savannah, G. U. S. A.

LA ESPERANTA INSTRUISTO, ĉiumonata. — Utila por alilanduloj, kiuj samtempe akiras la Esp. kaj anglan lingvojn. Specimeno : 8 Sd. Jarabono : 75 Sd. Oni akceptas p.-markojn, k. t. p. Administrejo : 135, Sellincourt Rd., Londono S. W. Anglujo.

KUN ESPERANTISTOJ en Holando, Ĥinojo, Japanujo kaj Rusujo volas korespondi S-ro W. T. Crossley, 197, Undercliffe St. Bradford (Anglujo); ĉiam respondas.

DELEGITOJ! Prezarojn petas Rotterdamsche gereedscharhandel, Nieuwe Markt, 11, Rotterdam, Nederlando. Societo por la vendado de iloj kaj maŝinoj por buĉistoj.

KONTINENTAJ PRODUKTOJ. — Firmo havanta urbcentran kontoron kaj vojaĝiston vizitantan eksportistojn kaj fabrikistojn volas reprezenti fremdajn firmojn A. Beverley and Co, Manchester.

PENSIONO. — Ĝenevo (Svisujo), Villa les Mélèzes, 17, chemin des Chênes. Pensiono por fraŭlinoj, saniga situacio, ellernado de franca lingvo kaj kompletigo de la edukado. Hejma vivado. Prospekto Esperanta ĉe la direktorino. Por pluaj detaloj sin turni al la direktorino.

ŜPARMONO 4 %. — Eldonejo « Esperanto ». Leipzig, Langestrasse, 27, Germanujo.

SVEDO, 22-jara, farinta ekzamenon pri « matureco » kaj pri « komerca kapableco », skribe posedanta la esperantan, germanan, francan, anglan kaj iom scianta la hispanan kaj rusan lingvojn, serĉas oficon kiel komerca korespondisto plej volonte en la maŝina aŭ metala branĉo en kia ajn lando de supre diritaj lingvoj.
Sin turni al Adolf Larson, Mosebacketorg 14, Stockholm, Svedujo.

PENSIONO. — Familio de geprofesoroj ĉe la superaj lernejoj akceptus kelkajn fraŭlinojn en pensiono. Vivo agrabla kaj gaja. Centra hejtado. Ĉarma artista hejmo kun mirinda situacio kaj bonega aero, borde de l'fama Geneva lago (*France*, Esperante, germane, angle). Adr. : S^ro^ Vittel, prof. « La Vegnetta ». *Morges* par *Lausanne* (Svisujo). *Esperanta prospekto* laŭ peto.

INDUSTRIA AGENTO posedanta seriozan klientaron, vizitanta orienton, centron kaj sudon de Francujo, proponas sian kunlaboradon al fremdaj firmoj por riprezenti ilin en Francujo.
Proponas ankaŭ deponejon por industriaĵoj aŭ komercaĵoj. Skribi al S-ro Macary, 27 strato Bonnand, Lyon, Francujo.

POR JUNULOJ. — F. L. G. Maréchal, B.-A. Direktoro (Lingva fako), Northern institute, internacia komerca lernejo, prezidanto de Internacia Asocio de Instruistoj, 384, Kingston Terrace, Leeds, Anglujo, akceptas fremdajn junulojn kiuj deziras ellerni la Angl. Lingvon kaj komercajn metodojn. Banejo ; biliardĉambro, fumĉambro, k. t. p. Jare 500 Sm.

DANKO. — La Del. de Halberstadt esprimas koran dankon al siaj samideanoj kaj samasocianoj en Dresden, Frankfurt a. M., Worms kaj Dijon pro la multaj afablaĵoj kun kiuj ili agrabligis al li la restadon en ilia urbo. Sinceran dankon al la Del. en Worms kiu gasteme lin akceptis en sia domo, kaj al la Dijon'anoj, kies daŭra afableco al li konigis kaj amigis ilian belan landon.

PLUMBISTOJ. — S-ro J. Forrestier, 29, Bank st. Aberfeldy (Skotlando) dez. koresp. kun sammetiistoj pri iliaj metodoj.

Komercaj reklamoj

ĈAMPANO ESPERANTO

Pro sia bongusto, pro sia natureco, pro sia komerca marko : « La Verda Stelo », tiu ĉampanvino de la firmo Gustave Ivernel ĉe Ay-Champagne, Francujo, speciale taŭgas por kongresoj, festenoj, kunvenoj, k. t. p.

Po 1 botelo : Sm. 1.10, 1.40, 2 laŭ kvalito ; Fr. 2.75, 3.50, 5 laŭ kvalito. La botelo prenita ĉe Ay.

Por mendoj, informoj kaj prezaroj sin turni al :
S-ro WILLERMOZ, U. E. A., N° 19 - 44.94.1 ĝenerala riprezentanto por la tutmonda Esperantujo.
Quai Lunel, 24, Nice, France.

MAX AMBERGER. — Munĥeno, Mullerstr. 8. Reĝa Bavara kortegliveranto. Konstruejo por ĉiuspecaj majstre manlaborataj citroj ; koncertcitroj kun plej forta tono kaj mondkonate plej facila ludebleco kaj kantebleco. La plej belaj citroj de la estanteco. Majstraj gitaroj, liutoj, mandolinoj, violonoj, tenejo da memŝpinitaj daŭremaj kordoj.
Ilustrita katalogo senpage kaj afrankite ricevebla.
Oni korespondas esperante !

GRANDA HOTELO DU GLOBE, Paris, 71, rue Monge (apud rue Lacépède). Posedanto A. Leclerc. Proksime stacidomoj Austerlitz-Lyon-Montparnasse kaj Sportoĝardeno Sorbonne-Luxembourg'a ĝardeno. Ĉambroj de 0,80 Sm. ĝis Sm. 2. La gemastroj estas esperantistoj.

CENT DIVERSAJ POŜTKARTOJ Esperantaj por elekti. Mendu prezaron de Eldonejo Esperanto Germanujo ; Leipzig, Langestr. 27.

9 LAMPIONOJ, formante la vorton Esperanto, Sm. 1.50 kaj sendelspezoj. Eldonejo *Esperanto*, Germanujo, Leipzig, Langstr., 27.

150 ESPER. POŜTKARTOJ diversaj Sm. 4.50 (100, 3 Sm.). Mendu prezaron. Eldonejo *Esperanto*, Germanujo, Leipzig, Langestr., 27.

INTERNACIA PROPAGANDA KORESPOND-POŜTKARTO, seslingve kun belega bildo de nia majstro. Po 10 ekz. Sm. 0.15 ; po 50 ekz. Sm. 0.55 ; po 100 ekz. Sm. 0.90 ; 1000 ekz. Sm. 5.20, afrankite. Oni akceptas ankaŭ poŝtmarkojn ĉiunaciajn, transpagilojn kaj Espĉekojn. *Germana Esperanto-Librejo*, Sternwarte 40, Leipzig, Germanujo.

La Administranto (Gérant) : DUVAL
Laborista Kooperativa Presejo, 15, rue Amiral-Roussin. Dijon (Francujo)

ĴUS APERIS :

1) **D^ro^ Andreo Fiŝer.** *Esperanta Legolibro* por lernantoj, 106 paĝoj, prezo 30 Sd.

2) **Ivan Turgenev.** *Anjo*, novelo tradukita el rusa lingvo de *D^ro^ A. Fiŝer kaj V. Zamjatin*, 64 paĝ., pr. 25 Sd.

Afrankite : ĉiu verko. — 3 intern. respondkuponoj, ambaŭ kune. — 5 int. respondkup. — Por grupoj kaj revendistoj — rabato. Transpagiloj de ĉekbanko Esp. akceptataj.

Mendeblaj ĉe *D^ro^ Andreo Fiŝer* (15, Sudebnaja, *Tiflis*, Rusujo).

Ĉampano por Samideanoj

FRANCA VINO

Speciala Marko por Esperantistoj
Verda Etiketo, Blanka Etiketo

L. HURINOWICZ
en **WASSY** (Hte-Marne) Franclando

Agentoj kun bonegaj referencoj estas dezirataj en ĉiuj landoj.

PROPAGANDAJ FOTOGRAFAĴOJ

Ĉiuj Esperantistoj devas tuj mendi la novan eldonon de la poŝtkartoj kaj fotografaĵoj de la Esper. Gazetaro, eldonitan de la Esperantista Gruparo Berlina.

100 poŝtkartoj kostas . . . . 1.70 Sm.
10 fotografaĵoj (40 sur 30 cm) 3.75 —

Sin turni al S-ro SOSTMANN, Berlin, Nw. 87, Levetrowstr. 23.

WÖRISHOFEN

Akvo kaj Montaerokuracoj

(Metodo Kneipp)

Aero-, suno kaj elektro banoj. Somero, kaj vintrosezono ; 629 m. s. l. m. KLIMATO SUBALPA. Loĝejo kaj flegado je ĉiuj bezonoj, en sanatorio, institutoj, hoteloj, pensionoj kaj vilaoj. 2 horoj de München-Augsburg. Nombro de fremduloj en 1909 : 9311 personoj. Prospektoj kaj informoj per la KURVEREIN.

Libertempo

agrabla, malkara, inter samideanoj en la plej bela regiono de la Rejna valo

per Esperanto

ĉar ekzistas esperantistaj pensionhoteloj, magazenoj, konsuloj, policanoj, kafejo, k. t. p. mallonge perfekta Esp. organizacio.

en Godesberg a/Rhein

la Rejna Esperanto-Kolonio !

Beleta ĝardenurbo kaj kuracloko apud Kolonjo. La aperinta gvidlibreto germane kaj esperante estas havebla por unu respondkupono de la Delegito de U. E. A.

Informpetojn adresu, aldonante respondkuponon al Theod. OSTER, Del. de U. E. A., Godesberg.

Studo per Ludo, bonega esp. kartludo (vidu *Revuo*, majo 1910). Prezo afr. 0.70 Sm. Mendu kunsendante la monon al la Del. de U. E. A.

AL LA KOLEKTISTOJ

Post kelkaj jaroj, *grandan valoron* havos la plena kolekto de la gazeto.

ESPERANTO

Do, rapidu mendi ĉi tiun plenan kolekton dum ĝi estas ankoraŭ havebla po malkara prezo.

La tuta Kolekto (75 n^o^ j), afrankite 4 $.
Sin turni al la Administrejo (10, rue de la Bourse, Genève).

Malnovaj n-oj antaŭ 1 Decembro 1908 ne estas izole aĉeteblaj.

ESPERANTAJ NOVAĴOJ

OFICIALA JARLIBRO DE UNIVERSALA ASOCIO. — Kvara eldono, 2^a^ serio. Aperinta la 17^an^ de majo. Afranke : 30 Sd.

JAPANAJ RAKONTOJ. — Kunmetitaj de Ĉif Toŝio. 71 paĝ. 20 Sd., afranke 24 Sd.

MARTA. — Rakonto de Eliza Orzezko, traduko de D^ro^ L. L. Zamenhof. Belega volumo da 240 paĝoj. 1.40 Sm., afranke 1.70 Sm.

LA BARBIRO DE SEVILLA. — Komedio de Beaumarchais. Srad. Sam. Meyer, 40 Sd., afranke 45 Sd.

Vortaroj

EMILE BOIRAC. — PLENA VORTARO ESPERANTO-ESPERANTA KAJ ESPERANTO-FRANCA. La dua volumo ĵus aperis. Po volumo 1.80 Sm., afranke.

KABE. — VORTARO DE ESPERANTO. — Tute en Esperanto, kun tre precizaj klarigoj pri ĉiu vorto. Bindita 1.60 Sm., afranke 1.85 Sm.

CH. VERAX. — ENCIKLOPEDIA VORTARETO ESPERANTA. — 250 paĝ. Bindita 2.40 Sm., afranke 2.60 Sm.

UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO
Rue de la Bourse, 10, Genève (Svisujo).

Granda Marko
« Ville de Paris »

INKOJ MIETTE

gluoj likvidaj, sigeloj

Jules MIETTE
102, Rue Amelot, PARIS-XI

HOTELO LOUIS-LE-GRAND

2, rue Louis-Le-Grand, Paris.

En belega loko, inter la Rue de la Paix kaj Avenue de l'Opéra. Moderaj Prezoj. Oni parolas en Esperanto. English Spoken. Man spricht Deutsch. Se habla Espanol.

Bad Reichenhall

La perlo de la germanaj alpoj, *mondfama salakvo-banloko, klimata kuracloko.* Plej grandaj pneŭmataj ĉambroj kaj inhalacejoj de la mondo. Jara vizitado : pli ol 35.000 personoj. Sezono : Majo-Oktobro. Kuracado de *malsanoj de la spirorganoj*, astmo, emfisemo, *kormalsanoj, virinsekso*, skrofolo, raĥito artrito, reŭmatismo, *resaniĝado. Riĉenhava amuzprogramo.* 250 kilometroj zorge bonstataj promenadvojoj en la tutan ĉarmegan ĉirkaŭaĵon. Gvidfoliojn oni bonvolu postuli de la Esperantista Grupo Bad Reichenhall.

Bijoux Helder

SANECO estas *trezoro*, kiun oni konservas facile, kiam oni havas bonan stomakon. Skribu : 6, rue du Helder, *Paris*.

La sola internacia signo estas :

la VERDA STELO « GASSE »

(8^a^ jaro).
kun ore skribita vorto « ESPERANTO » (déposée-registrita).

REKONIGILO ! PROPAGANDILO !

Pingloj, broĉoj, kravataj pingletoj : 1 : Fr. **0 75.** 10 : Fr. **6.** — 100 : Fr. **45.** — afr. kaj rekom.
Ĉensignoj (kun duoblo faco) 1 : Fr. : **1 50**, 10 : Fr. **12.** — Afr. kaj rekon.
Konto kun Ĉekbanko.

Mendu ilin al via grupo, aŭ per simpla poŝtkarta mandato al Sinjoro Emilo Gasse, 55, rue Fred. Bellanger, Havro, Francujo, aŭ al subtenejoj : Belgujo : S-ro. O. Van Schoor, Vondelstr. Antverpeno. Britujo : Esp. Oficejo Liverpool. Germanujo : Moller et Borel, Berlin. Hispanujo : Manuel Fuentès Bidebarrieta, Bilbao. Rusujo : Moskva librejo Esperanto, Tverskaja 28. Moskvo.

PARIS EGLI'S HOTELO INTERNACIA

11, rue Bachaumont (Bourse)

Moderna, centre de Paris, proksime Louvre kaj Bulvardoj. 90 ĉambroj. Tre moderaj prezoj.
Svisa mastro.
Oni parolas Esperante.

3.000 membroj
EN
FREMDAJ LANDOJ

Jara Kotizaĵo
2 dolaroj (4 $)

Membroj havas la jenajn profitojn :
Ricevi informojn el ĉiuj landoj
Konatiĝi antaŭ ol forveturi eksterlanden

CHARTERED A.-D. - 1900

Sinjorinoj
Sinjoroj
estas akceptataj por membreco
Prospektoj kontraŭ afrankpago
(senpage al la skeptikuloj)
Adresu leterojn kaj monon al
Sekretario de C. C. C.

Korespondi en fremdaj lingvoj
Interŝanĝi revuojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn
fotografaĵojon, plantaĵojn insektojn, k. t. p.

Milwauke, Wisconsin, U. S. A.

Vojo por aliĝi. — 1. Skribu vian nomon kaj adreson (legeble) kun unu aŭ pluraj referencoj. — 2. Skribu la lingvojn, kiujn vi komprenas. — 3 Konigu la temon pri kiu vi deziras korespondi. — 4. Sendu la kotizaĵon (4 $) per ĉeko aŭ poŝtmandato. Via nomo estos enskribata kaj vi ricevos ĉiujn paperojn kaj ekz. de *Globe Trotter* kun la plena listo de l'membroj.

MEDIZINISCHE LICHT- & HERZ- u. NERVEN-

Heilanstalt-Kuracejo

por lumkuracado
por malsanoj de l'koro kaj de l'nervoj.

vormals : ROTES KREUZ — antaŭe : RUĜA KRUCO

51 Luisenstrasse **BERLIN NW. 6** *Telefono III, 3185*

Sekcio por lumkuracado

Elektra lumo kun elektrodoj de karbo, fero, hidrargo. Lumo de Roentgen. Radiado d'Arsonval kaj de Oudin kontraŭ artrito, reŭmatismo, neŭralgio, iŝialgio, furunkulozo, diabeto, k. t. p.

Radiado kaj fotografado laŭ Roentgen

Sekcio por malsanoj de l'koro kaj de l'nervoj

Esploroj per radioj de Roentgen kaj konstatado de l'agado de l'koro. Banoj kun karbacido kaj ŝprucbanoj kun pinburĝonoj. Elektraj banoj por la tuta korpo kaj por apartaj membroj. Vibromasaĝo k. t. p.

La kuracado plene anstataŭas restadon en Bad Nauheim

Prospekto laŭ deziro — **KURACADO AMBULANTE. ONI PAROLAS ESPERANTE.** — Du kuracistoj — Direktoro : **Dr. BREIGER**

Interesega apero en la esperanta literaturo !

GRAVEGA POR LA KOMERCISTARO !

DUOBLA LIBROTENADO « MONDSISTEMO »

de E. WUCHER

Prezo : **1,25** Sm. neafrankita. Havebla de Bigalke & Mohwinkel, Schlechnitzstr. 6, *Bromberg* (German.).

50
Jara sukceso!

OSIJEKA VIZAĜPOMADO KAJ OSIJEKA SALVATOR-SAPO

forigas ŝprucmakulojn, kaj ĉian malpurajon de l'vizaĝo

Malfalsa sole nur en la Salvator apoteko

J.-C. DIENEŜ, OSIJEK (Essegg) (Kroatujo)

1 vazeto da osijeka vizaĝpomado kostas po 70 heleroj kaj po 1 Krono (1 Krono = 100 h. = 42 spesdekoj) ; 1 peco da Salvator-sapo 1 K. Unu vazeto da manŝmiraĵo 1 K. 20 h. Lyona pudro, malgranda skatolo 1 K. granda skatolo 2 K. Tiuj ĉi rimedoj ne havas domaĝajn konsistaĵojn kaj tutege respondas al la regularo de la alta registaro.

KIAL ESTAS UZOTA NUR

« MIRANDA-KREMO » ?

Ĉar *Miranda*-Kremo estas perfekte nedomaĝa, ĉar per « **Miranda-Kremo** » **oni atingas idealan belecon**, ĉar *Miranda*-Kremo forigas ĉian malpuraĵon de la haŭto, ĉar *Miranda*-Kremo ne nur **plibeligas**, sed ankaŭ **junigas**. Unu vazeto da « **Miranda** » **Kremo** kostas 1 K. Unu skatolo da « **Miranda-pudro** » (trikolora) 1 K. unu peco da « **Miranda** » **sapo** 70 h.

Ricevebla ĉe la produktanto **J.-C. DIENEŜ**, post Osijek, supera urbo, de kie mendoj per poŝtpaĝo tuj efektiviĝas

La korespondado kun la **Salvator-Apoteko**, de **J.-C. Dienes** estas ankaŭ en la lingvo **Esperanto** krom la lingvoj germana, angla, franca, itala, latina, kroata, serba, aliaj slavaj lingvoj kaj la magyara.

La korespondanto de firmo J.-C. Dienes estas Drag. Mirko Kaniĉar, Delegito U. E. A.



Tiu ĉi
SVEDA RAZILO
kostas
1 po 1.92 $
2 — 3.30
3 — 4.12 afrankite

Vidu la antaŭajn anoncojn en la gazeto.

John BYHLIGER, HEDEMORA (Svedujo)

Bonvolu atenti

Pensantaj homoj elektas kiel sian ĉiu tagan trinkaĵon ekfreŝigantan la nutraĵn.

Senalkoholaĵn Wormsaĵn Nektar-Vinoĵn

(vinber- kaj fruktmostoj)

Prezaron senpage kaj afrankite per

NEKTAR WORMS a/Rh. N° 248 (Germanujo).

firmon kaj markon !

DETRANĈU KAJ SENDU PLEJ RAPIDE AL
ESPERANTIO, 10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

1^a^ KONGRESO DE U. E. A.

AUGSBURG — *28 Julio - 3 Aŭgusto*

ALIĜILO

La subskribinto mendas (1). Sm

.... Karto(j)n de Kongresano	(3 Sm).		
.... Karto(j)n de Helpkongresano	(1 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de I^a^ Klaso (2)	(23 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de II^a^ Klaso (2)	(20 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de III^a^ Klaso (2)	(18 Sm).		
.... Oficialan Jarlibron de U. E. A.	(0.30 Sm).		
.... Kolekton de gvidfolioj	(0.25 Sm).		
.... Oficiala(jn) insigno(j)n	(0.36 Sm).		
.... Esperantiajn Markojn			
.... Karto(j)n de Kongresano de TEKA	(1 Sm).		
Kaj kunsendas per poŝtmandato (1)			
Ĉeko (1) — Bankbileto (1) — la sumon da			

Nomo (tre legeble) ....
Antaŭnomo : ....
Adreso : ....
Urbo : ....

---

(1) Surstreku tion, kio ne taŭgas.

(2) La kuponaro enhavas : loĝadon dum 6 noktoj kun frua matenmanĝo, partoprenon ĉe la malferma kaj festenoj, komunajn tag- kaj vespermanĝojn dum la tuta kongreso, ekskurson al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein (kun vojaĝo, vizito de la kasteloj kaj komuna manĝo).

ĴUS APERIS :

La Verko de Zamenhof

Parolado de **H. HODLER**, *Vicprezidanto de U. E. A.*

1 ekz. afr. 8 Sd. ; 3 ekz. 22 Sd. ; 12 ekz. 72 Sd. ; 24 ekz. — **$ 1.20**

UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO
10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta inter la 15. kaj la 20. de ĉiu monato

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ GAZETOJ ESPERANTISTAJ

[FONDITA EN 1895

La plej enhavoriĉa ! — **La plej malkara !**

48 paĝoj da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

5 fr. (2 $) abonprezo por UNU JARO

BAD-REICHENHALL en la germanaj Alpoj

VILAO CONTINENTAL

Plej bela, kvieta kaj senpolva altaĵloko. Ĉirkaŭata per ombraj ĝardenoj. Belega vidaĵo al la montaro kaj urbo. 40 elegantaj meblitaj ĉambroj kun 60 litoj kaj 25 balkonoj. Banoj en ĉiu etaĝo. Elektra lumo. Bonegaj manĝaĵoj. Puraj vinoj. Granda bela manĝoĉambro.

POSEDANTO : **Schwartz.** TELEGRAMADRESO : **Continental**

ONI PAROLAS ESPERANTE

GRAVA AVIZO !...

Gesamideanoj,

Jen alvenas la Jubileo. Por ĝin festi, ĉiuj, ĉiuj, ornamu viajn fenestrojn per esperantista flago.

Pri tio petu la senpagan ilustritan prezaron de flagoj Esperantaj kaj divernaciaj al la Firmo

Cuzon, 52, rue de Paris Charenton (Seine), France.

F. Emil Boden, Dresden (Saksujo)

Bismarckplaco 12

Esperantista Eldonejo :: Esperantista Librejo
Esperantista Presejo :: Artista Presejo ::

Atentu! La mendojn ni nur povas plenumi kontraŭ antaŭsendo aŭ pagoŝarĝo de la mono. Je antaŭpago ni petas aldoni 5% de la sumo por niaj sendkostoj.

Laŭmetoda, detala **Lernlibro de Esperanto**, verkita de Karl Schönherr, instruisto. 7^a^ eldono . . . . M 1.75
Lexikon deutscher Redensarten, ellaborita kaj en Esperanton tradukita de rektoro Wilh. Velten kaj R. Richter. Broŝurita M 2.50, bele bindita . . „ 3.—
Malgranda kantareto (kun notoj) . . . . „ 0.50
Dr. Zamenhofs Tabelle der Formwörter, verkita de rektoro Wilh. Velten . . . . „ 0.40